

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



Marzo
2008

№3

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2008. №3 (161)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2008

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la paĝo 27 de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 700 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2008.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2008, №3 (161).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 18 февраля 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Parolas Kaliningrado

“Parolas *La Ondo de Esperanto* el Kaliningrado. Saluton! Antaŭ la mikrofono estas Aleksander Korĵenkov. Hodiaŭ, la 5an de februaro, ni proponas nian unuan podkaston”, — ĉi tiujn vortojn via redaktoro direktis en mikrofonon, unuafoje ne intervjuate, sed proprainiciate alparolante la podaŭskultantojn.

Halt! Ja nun mi alparolas ne aŭskultantojn, sed legantojn, kiuj eble ne scias, pri kio temas. Nu, ne estas malfacile.

Adam Carry, distrieto el la usona MTV, kreis la neologismon “podcasting”, el la vortoj “iPod” (populara aŭskultilo de la kompanio *Apple*) kaj “broadcasting” (brodkastado). Podkastado do estas pretigado de publikaj sonregistraĵoj kaj reta distribuado de tiuj sondokumentoj, alivorte, podkasto. Podkasto estas riceveblaj per tiucelaj senpagaj programoj, ekzemple, *iTunes*, kiuj mem “kaptas” nove aperintajn elsendojn el via abonlisto. Tio estas granda avantaĝo kompare kun radio — oni ne devas atendi fiksitajn tempon, la podkasto mem venas en vian komputilon, kaj vi povas aŭskulti ilin en oportuna tempo, per komputilo aŭ per portebla sonaŭskultilo. Tiuj, kiuj abonas kaj aŭskultas podkastojn, estas nomataj podaŭskultantoj. Mi iĝis podaŭskultanto antaŭ unu jaro, kiam la Esperanto-Redakcio de Radio Polonia, senigita de kurtonda brodkastado, ekuzis podkastojn.

Ĉu facile? Jes, aŭskulti estas facile. Kaj pretigi? Eble, jes, sed ne por mi, kiu ĉiam forgesis premi/turni necesan butonon. Sed mi daŭrigu...

La Ondo aŭdebligis danke al miaj gefiloj. Tatjana, kiu laboras en Moskvo kiel tradukisto, donacis al mi podkastostudion de la firmao *Behringer*, kaj Aleksej testis ĝin kaj alportis ĝin el Moskvo al Kaliningrado. Danke al ili *La Ondo* krom la papera kaj la reta versioj, aperis ankaŭ sone.

Sed en la podkasto ni ne nur prezentos *La Ondon* kaj, kompreneble, ne la tuta numero estos legata, nur kelkaj tekstoj el ĝi. Laŭ nia modesta plano, ĉiumonate aperos du programoj: en unu oni konatiĝos kun nove eldonita *Ondo*, kaj la alia estos tema — literatura, historia aŭ muzika.

En nia unua podkasto tri parolistoj (Halina Gorecka, Andrej Peĉonkin kaj mi) prezentis la februaran *Ondon*. La unua programo plaĉis al la aŭskultantoj, kaj dum kelkaj tagoj ĝi estis alte en la listo de plej ofte aŭskultataj ruslandaj podkasto. La dua programo prezentas reagojn al la unua podkasto, Esperanto-novaĵojn, novan diskon de Jacques Yvart kaj humuran novelon de Anton Ĉeĥov.

Niaj podkasto estas aŭskulteblaj ĉe <http://la-ondo.rpod.ru/> (premu la sonvinjeton por aŭskulti).

Vi povas aboni la podkastojn de *La Ondo de Esperanto*. Se vi havas *iTunes* aŭ similan programon, enmetu la adreson <http://la-ondo.rpod.ru/rss.xml>, kaj vi ne devos zorgi pri ricevado de venontaj sonprogramoj; ĉio okazos per si mem.

Ĝis reaŭdo ĉiun duan semajnon!

AIKo

Tamen ne sonoj, sed libroj estas en la fokuso de la marta *Ondo*, precipe en la rubriko *Kulturo*, kaj tion montras la kovrilpaĝa foto “Libro: vojo” de Paulo Sérgio Viana, kiu ricevis la trian lokon en nia 10a Internacia Fotokonkurso.



Akiri eŭropan konscion!

Dimanĉe matene, la 9an de septembro 2007, en la flughaveno de Tuluzo, mi rigardis detale ĉiujn junajn pasaĝerojn venantajn el Londono. Unu el ili estis la Eŭropa Volontulo, kiun ni tuluze anoj atendas. Finfine mia rigardo interkruciĝis kun tiu de Przemysław (Przemek), nia atendata pola volontulo!

Ĝuante la plezuron de esperanta renkontiĝo, mi samtempe rememoris, kiom da klopodoj estis necesaj por atingi tiun rezulton.

Unue la ideo, naskita pro konstato, ke la statuso kaj la taskoj de Eŭropa Volontulo tre similas al tio, kion esperantistoj kutime faras kiam, vojaĝante, ili interŝanĝas sian scion kaj helpojn kontraŭ gastamo kaj nova sperto. Kial do la mono de Eŭropunio — kiu estas nia mono, de niaj impostoj — ne helpu vojaĝigi ankaŭ esperantistojn? Ĉu la celo de la Eŭropa Junulara Programo estas kreskigi la eŭropan civitanecon, klerigi la junularon, ebligi konsciiĝon kaj respekton al kultura diverseco ĉe ĉiuj? Precize tion faras ni, esperantistoj!

La dua paŝo estis serĉi precizajn informojn kaj kompili dosieron por taŭge prezenti nian projekton: akcepti junan volontulon, kiu helpu nian asocion diskonigi la internacian lingvon en lernejoj, kaj kiu ankaŭ klerigu niajn membrojn kaj tiujn de aliaj kluboj en tuta Francio pri la propra lando kaj koneksaj temoj pri kiu li kompetentas.

Tiu fazo estis la plej longa, ĉar pasis unu jaro inter la redakto de la unua projekto, kaj la sciigo ke ĝi estis “akreditita” en majo de la posta jaro, 2007. Dum monatoj nia dosiero senmove kuŝis en iu oficejo; sed kiam venis la tempo ĝin pri-decidi, mi suferis longajn telefonajn intervjuojn kun eŭropaj oficistoj, pri-demandantaj min, kvazaŭ en ekzameno.

En la ĵurio estis du personoj: unu funkciulino en Parizo, tre suspektema pri esperanto kaj esperantistoj — preskaŭ konsiderataj sektanoj — kaj unu funkciulino en Tuluzo, kiu delonge konis kaj aprezis nin, ĉar ŝi helpis niajn internaciajn infan-interŝanĝojn. Ŝiaj konsiloj, kaj ŝia opinio certe helpis, ke la fina rezulto estis pozitiva.

La tria fazo estis ege pli rapida, ĉar estis nur dek kvin tagoj por deponi la subvencipetan dosieron kun la nomo de la volontulo kaj ĉiuj financaj detaloj! Sen interreto tio ne eblus, kaj ankaŭ ne sen la bonŝanco, ke la unue anoncita kandidato estis... perfekte kongrua kun

la celata! Ankaŭ ne eblus sen la afableco kaj diligenteco de la bjalistoka sendo-asocio... Ĉio bona venas de Bjalistoko!

Jen kial tiun dimanĉon, mi atendis kaj akceptis Przemek kaj lian grandan valizon en mian etan aŭton.

Nun la ĉefa fazo komenciĝos, la “operacia” fazo. Ĉu la zorge planita situacio kaj antaŭviditaj taskoj de la juna volontulo taŭgos, kaj kontentigos nin ĉiujn? Ni povas parte respondi, ĉar li jam atingis la duonon de sia voluntula vojiro.

Przemek tuj komencis la kunlaboradon kun Samia, juna infangrup-gvidantino, kiu profesie klopodas proponi informadon pri esperanto en la lernejoj, kaj gvidas korespondajn klubojn kun lernejoj. Przemek simple sekvis ŝin ĉie. Lia nekono de la franca povis esti malavantaĝo, kiam temis pri paroli kun lernejdirektoroj, sed tute ne ĉe la infanaj klasoj aŭ kluboj: la infanoj ŝatis la ekzotikecon, kaj pacience aŭskultis la tradukon de la respondoj al siaj demandoj. En esperanto-kursoj kaj korespondaj kluboj, estis eĉ avantaĝo ne paroli la francan, ĉar la lernantoj pli serioze strebas kompreni kaj komuniki.

Kiam Samia havis aliajn taskojn, Przemek estis taskita reordigi la esperanto-asocian bibliotekon. Aliaj taskoj estas partopreni la diversajn informstadojn, helpi konceptadon kaj realigadon de ĉiusemajnaj radio-elsendoj, vigligi konversacian rondon por progresintoj, kaj, eble plej interese, prelegi pri sia

propra lando, kaj pri la statuso de eŭropa volontulo, en dudeko da francaj urboj.

Mi ne sukcesis scii, kion li plej ŝatas — ĉar li ĉion akceptas kun same ebena humoro — sed mi suspektas, ke estas ĝuste tiuj prelegaj turneoj tra la franca lando. Tie lin akceptas same varme urbaj asocioj kiel vilaĝaj kluboj.

El la vidpunkto de la akcepto-asocio, la sperto estas tre riĉa, kaj nepre sukcesa. Ne nur finance — ja Eŭropunio malavare subtenas la volontulon.

Pri infanoj, li efike helpas prezenti la kulturalan kaj lingvan diversecon, kaj levas la intereson de la infanoj, kiuj povas konstati fluan interparolon en esperanto. Li ankaŭ pliriĉigas la pedagogion, kontribuas kreadon de novaj ludiloj.

Rilate la plenkreskulojn, lia ĉeesto stimulis ĉiujn, la malpli junajn esperantistojn, ĝojajn koni tiel kompetentan junulon, kaj la junularan grupon, kiun li vigligas kaj internaciigas. Krom la “manĝoklaĉoj” jam ekzistantaj, li iniciatis konversaciajn renkontiĝojn en “lingva” kafejo de Tuluzo, kie kunvenas ankaŭ poloj, germanoj, serbokroatoj, kaj aliaj lingvanoj por praktikigi siajn lingvojn kun lingvolernantoj.

Nun ĉiuj francoj, kiuj renkontis lin, revas viziti Bjalistokon kaj la UK-on, kiun li priskribas tiel entuziasme!

Dankon, Eŭropunio; daŭrigu helpi niajn gejunulojn vojaĝi, spertiĝi, kaj akiri eŭropan (kaj esperantan) konscion!

Jeanne Marie Cash



Przemysław Wierzbowski volontulas. (Fotis Rokardo Cash)



Parlamentara akcepto en Pollando

21 jan 2008 Bogdan Borusewicz, Marŝalo de la Pola Senato akceptis Eduardon Kozyra (vicprezidanto de la Ĉefa Estraro de PEA), Halinan Szczepaniak kaj Henrikon Tonges el la Esperanto-klubo *Kastelo* el Malborko.

Dum la renkontiĝo oni preparolis la sukcesan Ago-Semajnon 2007 en Malborko, kies Honora Patrono estis la Marŝalo. La Esperanto-delegacio invitis lin al la Parko de la Mondo en Malborko dum la Postkongreso de IFEF (fervojistoj), kie 26 maj la Marŝalo kune kun la Prezidanto de IFEF plantos kverkon ĉe la Esperanto-memorŝtono de IFEF — nova, jam 35a ZEO en Malborko.

Bogdan Borusewicz konsentis akcepti la Honoran Patronecon de la 60a Internacia Kongreso de IFEF en Poznań (17–24 maj 2008). La renkontiĝon ĉeestis la direktorino de la Marŝala Buroo en Gdansk Margareta Gladysz, kiu iam lernis Esperanton en sia mezlernejo en Sopoto.

Eduardo Kozyra

Buller esploris pri UK en Kubo

Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA, 2–9 feb vizitis Kubon laŭ invito de Kuba Esperanto-Asocio. La celo de lia vizito estis esplori la kondiĉojn por okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto en Havano en la jaro 2010. Kun subteno de ŝtataj, urbaj kaj turismaj aŭtoritatoj KEA invitas la esperantistan mondrenkontiĝon al Kubo jam por la dua fojo. Unuafoje la UK sukcese okazis en la kuba ĉefurbo en julio 1990.

Buller renkontis funkciulojn de

diversaj instancoj, kies sinteno al la reokazigo de UK estas tre entuziasma. Li estis akceptita i.a. de Fernando Rojas, vicministro pri kulturo, kaj Conrado Martínez, prezidanto de la Kuba Kongresa Buroo kaj antaŭe urbestro de Havano. Krome li renkontis funkciulojn de la Ministerio pri Turismo, Kuba Libro-instituto, fremdlingva eldonejo *José Martí*, la nacia flugkompanio *Cubana* kaj Radio Havano.

Grava estis la rekonatiĝo de Buller kun la kongresejo, kiu en 1990 donis perfektajn kondiĉojn por la UK. Intertempe ĝi estis renovigita, kun alkonstruo de hotelo, kie la kongresejo disponas pri pliaj salonoj. La ĝenerala direktoro vizitis multajn hotelojn kaj restoraciojn, admirante la multobliĝon de ilia nombro kaj entute la radikalan disvolviĝon de turismo en Kubo dum la pasintaj 18 jaroj. Unu tagon li pasigis en la fama strandparadizo Varadero.

Dum la vizitoj Buller estis akompanata de estraranoj de Kuba Esperanto-Asocio. Buller ankaŭ kunsidis kun praktike la tuta estraro de KEA dufoje en la bela sidejo de la Asocio. Surpriza kaj agrabla estis la konatiĝo kun Abdel Fattah Ezzeldin, ambasadoro de Egiptio, kiu lernis Esperanton en 1982 en Budapeŝto. Li invitis Buller kun reprezentantoj de KEA al sia rezidejo por vespermanĝo, kiun ĉeestis ankaŭ la ambasadoroj de Jamajko, Kamboĝo kaj Pollando, honora konsulo de Finnlando, direktoro de la oficejo de Unesko por la Kariba regiono, kaj prezidantino k.a. funkciuloj de la Unesko-Komisiono de Kubo. La ambasadoro pruviĝis lerta pledanto por Esperanto, kiu kun siaj Esperanto-kolegoj kompetente respondis al

plej diversaj demandoj de la neesperantistaj gastoj.

7 feb okazis en la teatro de la Nacia Biblioteko José Martí simpozio pri la 100-jariĝo de UEA, kun partopreno de ĉ. 100-kapa publiko. La festparolanto estis Osmo Buller, kiu laŭdis la simpozion kiel “eble la unuan grandan aranĝon omaĝe al la jubileo de UEA”.

GK UEA

Bruselo: ekspozicio en EP

(*Eŭropa Bulteno*) Dum la du lastaj januaraĵoj okazis en la ejoj de la brusela Eŭropa Parlamento ekspozicio organizita de la slovena parlamentano Ljudmila Novak pri la slovenaj minoritatoj ekster Slovenio kaj minoritatoj en Slovenio. Ŝi disponigis parton de la ekspozicio al Esperanto, kaj la estraro de EEU taskigis la prezidanton kaj Majan Tiŝljar prizorgi la disponeblan spacon. Dezajnistino Danko Tiŝljar (fratino de Maja) pretigis ok afiŝojn por la kvar paneloj kaj la prezidanto prizorgis libran kaj alian materialon por ekspozicii sur la tablo.

En la malfermo krom Ljudmila Novak parolis ankaŭ Seán Ó Riain. Flory Witdoeck kantis la eŭropan himnon en Esperanto. Ĉeestis pluraj politikaj gravuloj, interalie, kelkaj ministroj de Slovenio. Dum la ekspozicio Maja distribuis informojn kaj faldfoliojn. Okazis pluraj interesaj interparoloj post la ekspozicio.

Zlatko Tiŝljar

Okaze de la Lingvojaro

(**Landa Agado**) 7 feb okazis en Italujo la unua publika evento aranĝita de Itala Esperanto-Federacio kunlabore kun provinca estraro okaze de la Internacia Jaro de Lingvoj. Temis pri kunveno pri la protektado de la itala, kiel gepatra lingvo okaze de la tago de gepatraj lingvoj (21 feb).

En Pesaro en salono de la provinca registaro parolis ĵurnalisto pri la troa kaj misa uzo de neasimilitaj vortoj en la gazetaro, lingvisto pri la situacio de la itala en Eŭropo, kaj mi mem, kiel prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, por klarigi kial esperantistoj defendas gepatrajn lingvojn, lokajn kaj naciajn.

La multnombra publiko vigle reagis kaj interesiĝis pri la eblecoj koncepti la defendon de naciaj lingvoj kaj la internacian komunikadon alimaniere. Estis disdonita informo materialo pri la jaro 2008a kaj Esperanto.

Renato Corsetti

IAM: riĉa kaj sukcesa sesio

Dum la unuaj naŭ februaraj tagoj la nuna interlingvistika grupo ĉeestis sian sesan kaj lastan sesion en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań. La persistaj 18 gestudentoj (el dek landoj) partoprenis entuziasme la prelegojn kaj praktikan laboron en tri specialiĝoj: komunikado, lingvistiko kaj metodiko.

Okazis kurso pri interkultura komunikado far prof. Humphrey Tonkin (lingvo kaj socio), Michael Farris (signolingvo kaj parolata lingvo); pri radia komunikado far Barbara Pietrzak; pri sociologiaj aspektoj de komunikado far d-ro Zbigniew Galor, pri vortospecoj kaj denaskismo far d-ro Balázs Wacha (Blazio Vaha).

La metodikan specialiĝon reĝisoris energie d-ino Katalin Kováts, tiel la ekzamenoj iĝis metiejaj diskutoj de veraj instruistoj. Kurson pri metodiko gvidis Maria Majerczak, metodikistino el la Jagiellona Universitato (Krakovo), kaj kontribuis Zsófia Kóródy kaj Ilona Koutny. La partoprenantoj havis eblecon testi sin mem kaj samtempe la unuan C1-nivelan teston (el la novtipa lingvoekzameno, kiun ILEI ellaboras kun la budapeŝta lingvoinstituto ITK por akreditigo).

La Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI decidis kunlabori en la formado de Esperanto-instruistoj, kiu delonge atendis solvon. La kontrakton inter la du institucioj nun subskribis la gvidanto de la Studoj, d-ino Ilona Koutny, kaj la dekanon de la Novfilologia Fakultato de UAM, prof. Józef Darski, vicdekanon prof. Jacek Witkoś, aliflanke Zsófia Kóródy, vicprezidanto de ILEI.

Enkadre de la komuna programo kaj formado estis ebleco jam en septembro aliĝi al la metodika specialiĝo de la Studoj, kiu realiĝas en la studjaro 2007/08. La ses aliĝintoj (el kvin landoj) krom la komunaj metodikaj kursoj kaj ekzamenoj povis partopreni lingvan perfektigon, minikursojn pri literaturo kaj gramatiko.

La sesion stampis la intensa kontribuo de Humphrey Tonkin. Li prelegis ankaŭ pri la nuntempaj problemoj de Esperanto-movado por la tuta grupo kaj eksteraj interesiĝantoj. El liaj prelegoj naskiĝis lia libro *Lingvo kaj popolo* (2006). La nova kurso estis denove instigita.

Por kolegoj kaj gestudentoj de la Lingvistika Instituto de UAM, kiuj grandnombre aperis malgraŭ la intersemestra ferio, li prelegis angle pri *Ekskludo kaj inkludo en Eŭropo: serĉado de eŭropa*

lingvopolitiko kun granda sukceso. Ankaŭ lia interparolo kun vicrektoro prof. Marek Kreglewski (kiu malfermis la publikan lingvopolitikan konferencon de la Studoj en septembro 2006) estis fruktodona.

Tradicie, okazis la komuna vespero de gestudentoj, geprelegantoj kaj lokaj esperantistoj. Krom la bonetosa vespermanĝo okazis libera kultura programo. Ekskurso al la bela kastelo kaj parko de Kórnik apud Poznań kompletigis la kulturalan programon. Fine estis ebleco renkonti la kunlaborantojn de E@I, venintajn laŭ la invito de Petro Balaž, partoprenanto de la Studoj.

Per tiu ĉi jaro la Interlingvistikaj Studoj atingis dek jarojn da ekzistado, pro tio septembre okazos festa interlingvistika simpozio, kaj novaj aliĝantoj estas atendataj (informoj: interlin@amu.edu.pl).

Ilona Koutny

Esperantisto por la Olimpikoj

Vespere 21 jan Zhong Sheng, 52-jara esperantisto el provinco Jiangxi (Ĉinio), ricevis telefonan sciigon de provinca aŭtoritato, ke li sukcesis kiel volontulo de Olimpikoj en Pekino.

La sekvan tagon en la loka ĵurnalo raportisto intervjuis kelkajn volontulojn, inter ili ankaŭ Zhong Sheng: “Per Mondlingvo (Esperanto laŭ ĉinlingva esprimo) bonvenigos amikojn el la tuta mondo”. En la intervjuo Zhong diris: “Mi kredas ke malmultas volontuloj kun mia aĝo (52) kaj kun mia lingvo Esperanto”.

Zhong estas la plej aĝa el la 80 sukcesintoj inter la ses mil kandidatoj de la provinco. Volontuloj ĉefe devenas de junaj studentoj. El la familio Zhong tri familianoj kandidatiĝis, inkluzive de lia filino kiu studas en Pekino. Tamen ŝi malsukcesis kaj envas sian patron.

La Olimpikoj en Pekino inkluzive de Olimpikoj por handikapitoj, bezonas 70 mil volontulojn. Dum pli ol duonjaro nombro de la kandidatoj proksimiĝis al miliono. Zhong konfesis, ke li bone utiligis la unikecon de Esperanto, ĉar la ekzamenintoj fakte ne bone sciis, kiel stas la afero pri Esperanto, kiu almenaŭ belas laŭ la ĉina nomo. Zhong ankaŭ, vid-al-vide, klarigis multe al sia ekzamenanto, kio estas kaj kiel stas Esperanto.

La aŭtoritatoj emfazas lingvan diversecon de la Pekinaj Olimpikoj por la volontula servo, kvankam sendube la angla certe superregos. Laŭ la plano, Zhong servos en la sportejo de skermado dum semajno, post semajna trejnado.

Ĉu tiam kaj tie li mirakle renkontiĝos kun iu esperantista sportisto aŭ vojaĝonto? Jam kelkaj esperantistoj preparas lanĉi projekton “Olimpikaj Hejmoj en Pekino por Esperantistoj tra la Mondo”. Ili bonvenigus ne nur esperantistajn sportistojn sed ankaŭ esperantistajn vizitantojn en siaj hejmoj.

Kontaktu ilin: trigo@tom.com

Laŭ *Libera Folio*

Peng Zhengming

Karnavalomeza konferencaro



Lorena. En la konferencoj oni ne nur kunsidas. (Fotis Milena Rinaldi)

3–4 feb, meze de karnavalaj tagoj, okazis en la Domo de Kulturo de Lorena (Brazilo) BEL-konferencoj 2008. Kun ĉeesto de kvindek da entuziasmaj partoprenantoj, sin sekvis sep altnivelaj prelegoj: pri “Lingvaj Rajtoj” (J. Passini), “Esperantaj Vortaroj” (Sylla Chaves), “Rendevuo kun Fernando Pessoa” (F. Wechsler), “Brazilaj Intelektuloj kaj Esperanto” (A. Sartorato), “UEA kaj la Brazilo Movado” (J. Pitton), “Komparado de Tradukoj en Esperanto” (F. Pessoa) kaj “Akademio de Esperanto” (G. Mattos).

Ĉiujn prelegojn oni kompletigis per multaj demandoj kaj komentoj, tiel ke la interŝanĝo de pensoj kaj opinioj estis tre fruktodona. Brazilo Esperanto-Ligo kaj eldonejo *Oportuno* disdonis senpage al ĉiuj partoprenantoj kajeron kun la tekstoj de ĉiuj prelegoj.

Urba semajngazeto *Atos* informis pri la evento. Radio *Cultura* intervjuis la organizinton pri ĝi, kaj la retejo de la urbo enmetis noton. Domo de Kulturo de Lorena disponigis tre taŭgan ejon, kun komputila projekciilo, kaj aliaj rimedoj.

BEL-konferencoj estas nova iniciato en la brazila movado, cele al plia flegado de niaj kulturaj valoroj, ĝenerala klerigo kaj stimulado al amika kaj riĉiga kunvivado. Nun la Estraro diskutos, ĉu oni enmetu ĝin en la kalendaron de aktivecoj de la Ligo.

Paulo Sérgio Viana



Oceania Kongreso en Auckland

La Oceania Kongreso (kuna kongreso de NZEA kaj AEA) en januaro estis ege granda sukceso kun 59 personoj, plejparte el Nov-Zelando kaj Aŭstralio, sed ankaŭ venis kongresanoj el Slovakio, Francio, Italio, Svedio, Francio, Malajzio, kaj ses el Nov-Kaledonio. Pro ĉi tiu nacia kaj lingva diverseco, la etoso estis vere internacia, kaj oni vidis kiel Esperanto vere funkcias, kiam personoj el diversaj gepatraj lingvoj sidas ĉe manĝotablo kaj interbabilas pri diversaj temoj.

Dum la kongreso okazis prelegoj, oficialaj kunvenoj de NZEA, kanthoroj, kvizo (kiun gajnis Trevor Steele), kaj kursoj preskaŭ ĉiutage.

Gvidantoj de la kursoj estis Stano Marček el Slovakio kaj Trevor kaj Katja Steele el Aŭstralio. Trevor gvidis kursojn por progresintoj, en kiuj oni studis lian novan libron *Kaj staros tre alte...* pri la ebla agado de Jesuo dum la periodo de lia vivo pri kiu la Sankta Biblio informas nenion.

Kongresanoj ankaŭ partoprenis en tri ekskursoj: al regiona parko kie oni povis promeni inter grandaj arboj kaj ĝui belan vidon, al bela kampara kaj marborda regiono norde de Auckland (kie kelkaj banis sin en la varma mara akvo), kaj al tipa maoria kunveno kie kongresanoj ĝuis tre bongustan maorian manĝon.

Novaj lernantoj de Nov-Zelando kaj Nov-Kaledonio ĉeestis la kongreson, kvankam ne alvenis amaso da novaj esperantistoj malgraŭ vasta reklamado. Tamen, granda propaganda sukceso estis du-minuta ero en la ĉefa novaĵprogramo de la ĉefa televida kanalo de Nov-Zelando, kiun vidis proksimume 500 000 da nov-zelandoj, en kiu la prezidanto de NZEA kaj AEA estis intervjuataj. La novaĵero estis pozitiva pri Esperanto kaj montris ankaŭ infanajn kongresanojn.

La kvina kuna kongreso formas parton de daŭra kunlaboro inter NZEA kaj AEA. Venontjare, ni esperas plu interŝanĝi ideojn kaj kunlabori pri diversaj aferoj. Ni ankaŭ esperas ke sufiĉe multe da Nov-Zelandoj povos partopreni la venontjaran someran kurson en Sidnejo.

La prezidanto de NZEA raportis ke la ĉefa agado dum 2007 estis la Oceania Kongreso kaj reklamado pri ĝi en Nov-Zelando kaj eksterlande. Pluraj personoj kontaktis NZEA por peti informojn pri Esperanto. Laŭ la tutnacia popolnombro de 2006, 123 personoj en Nov-Zelando diras povi paroli Esperanton.

David Ryan, Prezidanto de NZEA

Infanlibra projekto per Esperanto

(*Libera Folio*) La Eŭropa Komisiono aprobis tradukprojekton de infanlibroj, en kiu Esperanto rolas kiel ponto-lingvo. La projekto, kiun ellaboris por Kroata Esperanto-Ligo Zlatko Tišljarić, kaj en kiu partoprenis kiel partneroj *Edistudio* el Pisa (Italio), *Inter-kulturo* el Maribor (Slovenio) kaj barata eldonasocio *Samatat Siksha — Samatat Prakashan* el Kalkato estis aprobata de kultur-fonduso de Eŭropa Komisiono.

EU financos la projekton per 64.000 eŭroj. La projekto antaŭvidas ke ĉiuj partneroj (itala, slovena, kroata kaj barata) tradukos el siaj lingvoj unu infanlibron al Esperanto. Poste la barata partnero plustradukos la tri eŭropajn librojn el Esperanto en la bengalan, kaj la tri eŭropaj partneroj tradukos la baratan libron ĉiu al sia nacia lingvo.

Post kiam ĉiuj eldonos la librojn, oni distribuos ilin en elementaj lernejoj de siaj urboj kaj organizos legokonkurson inter la infanoj. La plej bonaj verkoj de la infanoj pri libro legita kaj apartenanta al alikontinenta kulturo estos premiitaj. Pri la tuto la eldonistoj daŭre informados la gazetaron, radion kaj televidon.

La barata partnero kunlaboras kun la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta. La projekto estos efektiva inter majo 2008 kaj majo 2010. Tiu estas la unua tiaspeca interkultura projekto uzanta Esperanton, kiun EK finance subtenas.

Zlatko Tišljarić

Oni povas mendi ĉe ICH bonkvalitajn Esperanto-flagojn en la formatoj 150×90 cm kaj 90×55 cm ankaŭ por subteni la unuan Esperanto-urbon. Foton vidu ĉe <http://esperanto.urbo.spaces.live.com>.

Pastro Eichkorn honorita

La germana prezidento Horst Köhler distingis pastron Bernhard Eichkorn per la ordeno *Bundesverdienstkreuz* (Federala Meritkruc). Li tiamaniere honoras lian multjaran per-esperantan agadon por ekumenismo kaj kompreniĝo inter la popoloj. La solena transdono de la ordeno okazos marde, la 20an de majo 2008 en Villingen-Schwenningen.

Ulrich Matthias

300 mil diskoj senpage por poloj

1 jan 2008 Peter Baláž nome de E@I subskribis kontrakton kun la urbo Bjaliŝtoko pri kreado de multimedia disko, kiu instruos Esperanton kaj prezentos la Esperanto-movadon al la pola publiko.

La KD-on oni devas pretigi ĝis la fino de julio. La KD-on planas senpage eldoni dua plej granda pola tag-jurnalo *Gazeta Wyborcza*. La planata eldonkvanto estas 300 mil ekzempleroj.

Peter Baláž

Freŝa kaj favorpreza FREŜO

Frusomera Renkontiĝo FREŜO, kiu okazos 26 jun — 2 jul en Olsztyn (Pollando), havos relative malmultekostajn prezojn. Unudiurna loĝado kaj manĝado kostos nur 30 zlotojn (ĉ. 9 eŭroj).

Venu por ripozi kaj gajni nebagatelajn premiojn dum ĉiutagaj kvizoj. Pli multe sciu el nia revuo: <http://forum.esperanto.org.pl/viewforum.php?f=10>

Detalajn informojn petu ĉe Elżbieta Frenszkowska

✉ 10-684 Olsztyn, ul. Orłowicza 35 m 5, Pollando

✉ efrenszkowska@wp.pl

Marian Zdankowski

Revenas mi... Iso en Germanio

Post la pasintkajeraj informartikoloj pri AS, IF kaj NR, ni aperigas “lirikan raporton” pri IS, kiun verkis Aneta Będkowska, kies foto paradas sur la februara kovrilpaĝo de *La Ondo*.

Kelkajn jarojn post mia kabeiĝo, mi revenis al mia, iam plej ŝatata Internacia Seminario. Ĝi okazas ĉiam dum jarŝanĝo, ie en Germanio. Ĉi-foje en Würzburg, en Bavario.

Tuj post mia registriĝo iu samideano rigardis mian nomŝildon kaj miris: “Ho, vi venas el Pollando. Kial do vi ne partoprenas la AgoSemajnon kiel ĉiuj aliaj poloj?” “Ĉu estas puno partopreni la Ison?”, — mi pretis demandi. “Ĉu la Iso perdis dum tiuj kelkaj jaroj sian bonegan etoson, kiun mi tiom bone memoras?” — mi demandis min mem. Nu, ni vidu...

Mi ekserĉis miajn malnovajn geamikojn. Neniu el ili venis, bedaŭrinde. Tamen soleco ankaŭ ĉi-foje ne estis mia destino, kaj dum la sama tago mi interkonatiĝis kun tre valoraj personoj, certe en amikeca senco. Kaj nokte, dum koncerto, aperis unu el miaj bonaj amikoj, kiun mi ne vidis delonge. Mi tiom ĝojis, tiom parolis (kriis, ĉar la muziko estis laŭta), ke matene mi vekigis... senvoĉa. Komenco de Iso, sed mi jam ne povas babili!!! Nu, restis partopreni programerojn kaj observi.

Kaj la programo estis abunda. La tema programo *Popola identeco* havis ĉiutage kontinenton kiel temon de prelegoj, diskutrodoj kaj lingvaj kursetoj, kiu ampleksis manĝadon kaj trinkaĵon aĉeteblan en la trinkejo. Movada programo inkluzivis Esperanto-kursojn, ekzamenojn de ILEI kaj UEA, studsesietojn pri la Cseh-metodo kaj kompreneble kunsidon de TEJO. La distran programon, ĉar oni ja devas amuziĝi dum Iso, kreis diversspecaj ludoj, ŝaradoj, danc-kursoj kaj manfaritajkursoj.

Precipe ekskursojn mi tre ŝatis. La urbon kaj montecan ĉirkaŭaĵon ni esploris verŝajne ĉiudetale kun bone informita gvidanto (kaj talenta kantisto, poste evidentiĝis). La vagadoj okazadis preskaŭ ĉiutage kaj estis enplektitaj en la programon, tiel, ke tiu, kiu ne ŝatis promeni partoprenis alian programeron. Tamen unufoje mi ne rimarkis, ke la kulinara festivalo okazadis samtempe, kaj rezulte mi disdonadis la bongustajn polajn kolbasojn kaj ŝafajn fromaĝojn inter partoprenantojn, ĉar ne eblis manĝi ĉion, kion mi kunportis. Mi nur demandis, kiu estas

vegetarano kaj kiu ne. Mi ne demandis ĉu vi volas aŭ ne... La mielvino eltenis feliĉe ĝis la silvestra bufedo kaj balo. Tiu estis bonega. Kaj manĝoj kaj dancoj (ankaŭ danckonkurso). Fojfoje inter ni aperadis verdaj kreaĵoj, moviĝantaj strangmaniere, eligantaj fremdajn sonojn. Vi miras, kial? Ĉar la temo de la silvestra balo estis “Eksterteranoj”!

Eĉ oni povis iĝi milionulo dum tiu ĉi Iso. Nu, la premio ne estis vera miliono sed senpaga partopreno en la sekvonta aranĝo. Tamen “vere vera” estis la aspekto de la ludo, konata certe al ĉiu, do mi ne rakontu detalojn. La kandidatiĝo al la ludo, demandoj mem, muziko, la tuta komputila prilaboro kaj gvido de la ludo estis perfekte preparitaj. Kaj kredo, neniam mi vidis tiel mallaŭtajn kaj koncentritajn la spektantojn.

Pro mia voĉo mi ne tro babilis, ĉar preskaŭ neniu min aŭdis. Do, mi aŭskultis aliajn. Kaj mi sciigis, kio ne plaĉis al ili (ankaŭ al mi, fakte). Ekzemple oni ne tro ŝatis la koncerton de grupo, kiu tro ofte “repis” la frazojn “mi ne ŝa-tas”, “mi ne vo-las”. Tamen ili decidis kanti, malgraŭ, ke nevolonte. Oni plendis, ke ne ĉiunokte okazis diskoteko. Nu, mi vidis homojn post la vespera programo, sidantaj sur benkoj, babilantaj, kvankam de tempo al tempo kaŝrigardantaj al direkto de diskejo kaj aŭskultantaj, ĉu hazarde muziko aŭdeblas. Unufoje eĉ, rusa-franca unio demandis la organizantojn, ĉu estas iu dancejo proksime al

ISEjo por iom amuziĝi. Nu, tiam oni jam ne povis rifuzi kaj la diskoteko finfine ekis... je la 2h30 nokte. Kaj malgaja afero, tamen tute ne dependa de la organiza teamo — Iso iĝis unu granda mal-sanulejo. Preskaŭ ĉiuj malvarmumis: la organizantoj mem, la partoprenantoj en la junulargastejo kaj en la memzorgantejo. Sed ĉu, se preskaŭ ĉiu estas malsana, la etoso devas esti malbona? Tute ne, homoj amase vizitadis gufujon kaj trinkis bongustajn, varmigajn teojn, babilis aŭ spektis la trankvilajn koncertojn, kiuj okazis ankaŭ tie.

La lastan vesperon, aŭ eble nokton, mi revenis al memzorgantejo por iom manĝeti kaj hazarde mi aŭdis interparolon de du samideanoj: “Ni iru al ISejo” — proponis la unua. “Ne, ja diskoteko ne estas, kion ni faru tie?” — demandis la dua. “Homoj estas tie, bonegaj, frenezaj homoj! Venu!” Do, vidu. Mi jam rajtas ripeti ies frazon, ke la homoj faras la etoson. Kaj organizantoj helpas teni la ordon. Kaj mi ĉiam ŝatis tiun germanan ordon kaj ties organizadon. Preskaŭ nenio ŝanĝiĝis, krom etaj malavantaĝoj, kiuj certe estos plibonigitaj venontfoje. Mi ankaŭ rimarkis grandan kontribuon de partoprenantoj al la funkciado de Iso. Kaj ĉu Iso maljuniĝas? Certe tute ne. Nu, kvankam mi mem ne estas la plej bona ekzemplo, ĉar laŭ la kotiztabelo mi ne plu apartenas al la junularo. Anime tamen ĉiam kaj al Iso mi revenos!

Aneta M. Będkowska



Eĉ senvoĉe Aneta reklamas en IS, ja sufiĉas montri, ne paroli.

Unufraze

★ Danke al la atento de UEA al la agado de Unesko k pro la aktivado de UEA por diskonigi la Internacian Jaron de Lingvoj (IJL) 2008 Unesko afiŝis en sia retejo E-tradukon de la deklaro de la ĝenerala direktoro de Unesko, Koiichiro Matsuura pri IJL; E-istoj ankaŭ helpis traduki la deklaron de Matsuura al diversaj lingvoj. (GK UEA)

★ 5 feb BBC Word Service elsendis intervjuon kun svisa parlamentano kun d-ro John Wells pri propono de UEA kiel kandidato por la pacpremio de Nobel; similajn informojn diskonigis France-Inter, pluraj gazetoj, radioj k retejoj en diversaj landoj.

★ 26 jan Jadwiga Wasiuk, prezidantino de Koĉevia E-Asocio (Pelplino, Pollando), en la tradicia urba balo ricevis premion *Mestwin 2007*, en la kategorio *Kulturo*, pro promociado de Koĉevia regiono en Pollando k en la tuta mondo per Eo. (Eduardo Kozyra)

★ Por la kvara sinsekva jaro la asocio *Langue espéranto* en Paŭo (Francio) partoprenis en la urba *Salono de Libro* sub la nomo de SAT-Amikaro. (*La Sago*)

★ Studkontrolon pri Eo plenumis 49 studentoj en la universitato de Brno k 9 studentoj en Olomouc, Ĉeĥio. (*Esperanto*)

★ Kultura Kooperativo de E-istoj (Brazilo) efektivigis la 61-an sendon de la kampanjo “Eo en la bibliotekojn”; ĉi-foje al la urba biblioteko “Donatila Borba” de Criciúma (ŝtato Santa Catarina) oni sendis pakajon kun dek libroj en/pri Eo. (Aloisio Sartorato)

★ Je 13 feb al la 93a UK aliĝis 1195 personoj el 59 landoj: Francio 155, Germanio 133, Nederlando 123, Japanio 85, Belgio 62, Italio 47, Litovio, Pollando k Ruslando po 42. (GK UEA)

★ 18 jan 2008 en simpozio pri la kognaj lingvistiko en la Lingvistika Labora Ejo de la Barata Statistika Instituto en Kolkaato Probal Dasgupta en sia raporto reliefigis la rolon de Eo en la siainstituta projekto pri generado de leksiko por la bengala lingvo k la rilaton de tiu laboro al la Internacia jaro de lingvoj. (Probal Dasgupta)

★ Retpaĝaro *Lernu.net* je sia kvinjariĝo en decembro 2007 havis pli ol 43 mil registritajn uzantojn, kiuj faras ĉ. 100 mil vizitojn monate. (*Esperanto*)

★ La eldonkoperativo de SAT planas eldoni 150-paĝan libron, en la serio *Faktoj kaj dokumentoj*, pri liberaj programoj. (*Sennaciulo*)



Al la ĵurnalista mondkongreso

Bone progresas preparado de la tutmonda kongreso de esperantistoj-ĵurnalistoj (Vilno, 26–30 maj 2008). La organizantoj renkontiĝis kun gravaj funkciuloj — la unua vicprezidanto de Litovia parlamento, Ĉeslovas Jurŝenas, ministro de kulturo Jonas Jučas, urbestro de Vilnius Juozas Imbrasas kaj vicurbestro Algirdas Peleckis k.a.

La unua kongresa tago (26 maj) estos ekskursita tago.

27–28 maj la kongreso laboros en la malnova urbodomo de la ĉefurbo de Litovio ekde la 9a ĝis la 18a horo. Dum vesperoj okazos akceptoj (la urbestro akceptos ĉiujn kongresanojn) kaj koncertoj. 27 maj okazos inaŭguro kaj plenkunsidoj, 28 maj — sekcijaj kunvenoj.

29–30 maj la kongreson akceptos la Konstitucia salono de la Parlamentejo. Ambaŭ tagoj estos plenkunsidaj. La parlamentestro, Viktoras Muntianas, venos por saluti la kongresanojn.

Jam aliĝis 53 personoj el 20 landoj. Certe, kiel antaŭvidite, estos ĉ. cent partoprenantoj el 30–40 landoj.

La kongresan temon *Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto* enkondukos kaj reĝisoros prof. Humphrey Tonkin. El amaso da ricevitaj proponoj nun estas kompilata definitiva kongresa programo.

Danke al gazetara komunikado de Litova Ĵurnalista Asocio, sendita al ĉiuj litovaj amaskomunikiloj, pluraj gazetoj, inkluzive de la tutlandaj *Lietuvos aidas* kaj *Respublika* informis pri la kongreso.

La organizadon de la kongreso subtenas UEA kaj TEĴA. Funkcias 10-persona loka organiza komitato, kiu pri la programo kaj aliaj ĉefaj aferoj konsultiĝas kun estraranoj de TEĴA kaj aliaj spertuloj. Aperos ampleksa kongresa libro. Aktualajn informojn eblas trovi en la retejo de Litova Esperanto-Asocio: www.esperanto.lt.

Povilas Jegorovas

Universitataj kursoj

Germain Pirlot afable sendis la novan liston de Esperanto-kursoj en universitatoj kaj aliaj superlernejoj.

Laŭ ĉi tiu listo, Esperanto nun estas instruata en 68 universitatoj de 24 landoj. Plej multaj kursoj (18) estas en Ĉinio. En Azio estas 30 universitat-nivelaj kursoj (inkluzive de du en la azia parto de Ruslando), 25 en Eŭropo, 13 en Ameriko, neniom en Afriko kaj Oceanio

Aŭstrio	1	Kostariko	3
Belgio	1	Kubo	1
Brazilo	3	Litovio	2
Bulgario	1	Meksiko	1
Ĉeĥio	2	Nederlando	1
Ĉinio	18	Pollando	3
Germanio	2	Ruslando	5
Hispanio	2	Slovenio	1
Hungario	2	Svedio	1
Italio	2	Ukrainio	1
Japanio	7	Usono	4
Korea Resp	3	Venezuelo	1

Supozeble funkciaj aliaj kursoj, pri kiuj Pirlot ne estis informita. Tamen estas klare, ke la nunaj kursoj estas malpli multaj ol antaŭ dudeko da jaroj, kiam ankaŭ UEA havis pli ol duoble da membroj ol nun, kaj kiam la Universalaj Kongresoj estis pli amasaj.

Dato	Landoj	Kursoj
decembro 1977	21	58
januaro 1981	19	51
januaro 1982	15	56
decembro 1983	17	79
decembro 1984	22	109
junio 1986	28	125
junio 1988	24	107
junio 1988	19	91
junio 1992	23	90
novembro 2002	20	43
februaro 2004	23	63
januaro 2006	26	75
januaro 2008	24	68

Petu la tutan liston kun detaloj pri ĉiu kurso ĉe la kompilinto (gepir.apro@pandora.be) kaj kompletigu ĝin.

AIKo

La Civito: aliĝpeto el Israelo

“Jam en 2006 ni movaduloj en Centro Sivron decidis informiĝi pri la Esperanta Civito por eventuala aliĝo. Kaj nun dum la decembra jarkunveno 2007 ni fine akceptis la ideon fariĝi paktinta establo”, — komunikis Jeremi Gishron al la Konsulo pasintmonate.

Centro Sivron (Jerusalemo) aktivis por mond-civitanejo laŭ hilelismaj principoj, kion ĝiaj membroj (ne nur en Israelo) nomas “homekologio”. Ĝi estas la 29a establo kiu petas la aliĝon al la Pakto. La peton traktos la parlamenta sesio en Bruselo 25–26 jul 2008.

HeKo

Bone redaktita, interesa kaj sendependa

Al la enketilo de *La Ondo* venis 91 respondoj (rete senditaj duoblaj forprenitaj), kaj dum la nombro de abonantoj estas malpli ol 600 la rezulto donas relative bonan eblecon taksati la opiniojn de legantoj ĝenerale. Tamen, la konkludoj ĝeneraligeblas nur al tiuj, kiuj respondis al la enketo.

Respondoj venis entute el 32 landoj, kaj el la respondintoj 23% estas el Ruslando kaj 14% el Germanio. El la respondintoj sesono estas ekstereŭropaj. Proksimume duono el enketiloj estis plenigitaj rete. La respondintoj naskiĝis inter 1923 kaj 1981. La meza aĝo de la respondintoj estas 58 jaroj kaj ili lernis Esperanton plej ofte en la aĝo inter 16 kaj 26 jaroj. Tamen estis ankaŭ kelkaj, kiuj komencis lerni Esperanton kiam ili estis pli ol 50-jaraj. La meza jaro por komenci lerni Esperanton estis 1980.

Ĉirkaŭ duono komencis legi *La Ondon* antaŭ 2001, kiam la eldonejo situis en Jekaterinburgo. Ruslandaj respondintoj legas ĝin kutime pli longe ol la alilandaj. Aparte multe da novaj legantoj estas inter ekstereŭropaj respondintoj.

La plej popularaj temoj en *La Ondo* estas intervjuoj, artikoloj pri Esperanta kulturo, beletraĵoj kaj novaĵoj. Ankaŭ kovriloj de la gazeto estas taksataj alte; laŭ iuj skribaj respondoj la ekstera aspekto eĉ superas la enhavon.

Populareco de temoj, meza valoro inter 1 (malbonega) kaj 5 (bonega):

Intervjuoj	4.31
Kovriloj	4.28
Esperanta kulturo	4.27
Originala beletro	4.25
Esperanto-novaĵoj	4.16
Tradukita beletro	4.13
Recenzoj	4.12
Socio, historio, kulturo	4.00
Temaj artikoloj	3.99
Internaj fotoj	3.99
Leteroj de legantoj	3.93
Unufraze	3.85
Tribuno	3.84
Vide el Bruselo	3.79
Mozaiko	3.78
Komitatano Z	3.68
Komentarioj de Alen Kris	3.59

Opiniaj temoj (Komitatano Z, Alen Kris, *Vide el Bruselo*, *Tribuno*) ne estas inter la plej popularaj. Krome relative granda parto (10–18%) ne indikis sian opinion pri tiuj temoj (do, eventuale ne legis ilin). Opiniaj temoj ankaŭ dividas la legantojn plej multe, iuj opinias ilin

tre bonaj, dum kelkaj estas malkontentaj. Aparte pri Komitatano Z aperis eĉ skribaj plendoj, la anonimeco de la aŭtoro estis malfavorata de kelkaj. Tamen unu skriba komento esprimis la deziron legi pli ofte la kontribuojn de Komitatano Z.

La Ondo de Esperanto estas, laŭ siaj legantoj, bone redaktita, interesa kaj sendependa. Ĝi havas utilajn, interesajn recenzojn kaj estas aktuala. Tamen malpli altajn poentojn la gazeto ricevas pro tio, ke ĝi ne havas sufiĉe grandan kvanton da tekstoj pri neesperantaj temoj, pro mankoj de multtendenceco, modernece kaj originaleco. Pri multtendenceco aperis ankaŭ kritiko, ke en *La Ondo* estas tro multe da Esperanta Civito. Malgraŭ tio eĉ la plej malaltaj rezultoj estas meznombro super la meza valoro 3. Plej proksime al la mezo estas la opinio rilate la longecon de artikoloj. Do, inter tro longaj kaj tro mallongaj artikoloj la meza rezulto fakte indikas, ke la longeco estas proksimume taŭga.

Pli novaj legantoj de *La Ondo* pli ofte donas malpli altajn poentojn al interesece kaj havas ankaŭ dubojn pri la mondvasteco de la gazeto. La ekstereŭropaj respondintoj tamen ne diferencas de la eŭropaj surbaze de la opinio pri mondvasteco. Ruslandaj legantoj opinias *La Ondon* malpli ofte multtendenceca, sed taksas la originalecon de la enhavo pli alte ol alilandaj respondintoj, eventuale pro la malpli vasta aliro al aliaj Esperantaj tekstoj.

Du trionoj el la respondintoj aĉetis librojn surbaze de recenzoj en *La Ondo*, almenaŭ unu-du foje.

Ĝenerale la legantoj estas kontentaj kun la gazeto, kaj pri tio atestas ankaŭ granda kvanto da tiuj, kiuj volas resti plu abonantoj de *La Ondo*; pli ol 70% faros tion certe, eĉ 80% se inkluzivi tiujn, kiuj pretas aboni, se ili havas monon. Tamen ankaŭ tiuj, kiuj respondis, ke ili ne reabonos (eble nuntempe legas nur la retan version), estis relative kontentaj. La solaj pli grandaj diferencoj estas tiuj, ke malpli firmaj abonantoj opinias *La Ondon* malpli interesa kaj malpli sendependa. Rilate temojn, la malpli firmaj legantoj pli ofte ne ŝatas intervjuojn, *Mozaikon*, *Tribunon* kaj fotojn, inkluzive kovrilojn same multe.

Legantoj de *La Ondo* legas kutime ankaŭ aliajn Esperanto-gazetojn. El la respondintoj ĉ. 75% legas almenaŭ unu alian internacian Esperanto-gazeton,



Jukka Pietiläinen estas la plej konata nuntempa fakulo pri la Esperanta gazetaro.

dum 25% ne legas aliajn gazetojn aŭ legas nur landajn Esperanto-gazetojn. La legado de aliaj gazetoj ne multe influas al la opinioj de legantoj: tute nature la legantoj de aliaj gazetoj ne taksas la novaĵojn en *La Ondo* same alte. En skribaj komentoj aperis, ekzemple, ke estas tro multe da artikoloj similaj al tiuj en *Esperanto*, *Monato* kaj *Kontakto*. Tamen la legantoj de multaj gazetoj planas, eĉ pli firme ol la aliaj, daŭrigi sian abonon al *La Ondo*. Ankaŭ tio estas bona indikilo pri la kvalito de la gazeto.

La plej oftaj aliaj Esperanto-gazetoj, kiujn la respondintoj legas, estas revuo *Esperanto* (ĉ. 50%) kaj *Monato* (ĉ. 40%). Poste sekvas *Kontakto* (ĉ. 20%) kaj *Heroldo de Esperanto* (ĉ. 20%). La nombroj estas rondigitaj supren pro tiuj, kiuj respondis nur, ke ili legas plurajn gazetojn. Plimultaj respondintoj legas ankaŭ landajn aŭ lokajn Esperanto-gazetojn. Por multaj legantoj la legado de *La Ondo* estas konscia elekto, kaj la legantoj estas ĝenerale kontentaj. *La Ondo* trovis sian niĉon en la merkato, kaj la populareco de aliaj Esperanto-gazetoj inter la legantoj ne malhelpas *La Ondon*, eble eĉ male.

Kiel mankojn kelkaj indikis tro malmultajn artikolojn pri la vivo en Ruslando kaj pri ekstera (neesperanta) mondo, kaj ankaŭ pri strategio de la Esperantomovado. Iuj opiniis la kvanton de literaturaj tekstoj tro multa, tamen ili estas inter la plej favorataj materialoj.

Jukka Pietiläinen



Komisiono atakas Esperanton

(Vide el Bruselo) Post la intervjuo en la januara *Ondo*, Leonard Orban, EU-respondeculo pri multlingvismo, konkretigis sian negativan sintenon al la lingvo de Zamenhof. En februara letero al retforumo de la eŭropa komisiono pri multlingveco, Orban klarigis, kial Esperanto neniam povas fariĝi oficiala lingvo en Eŭropa Unio. La sinteno de Orban kreis ŝtorman proteston de verdaj retumuloj kaj kontraŭ-proteston de kelkaj el la elitaj esperantistoj.

“La multlingvismo de la Eŭropa Unio estas difinita ene de klaraj limoj per Komunuma Leĝo”, — klarigis Orban en la retforumo. Li detalis, ke lingvo povas fariĝi oficiala en EU, se ĝi plenumas tri kondiĉojn. Unue, ĝi devas esti oficiala lingvo de Membro-Ŝtato, menciita en ties Konstitucio; due, la koncerna Membro-Ŝtato devas peti ĝian agnoskon kiel oficiala lingvo je EU-nivelo; trie, la aliaj Membroj-Ŝtatoj devas unuvoĉe akcepti la novan oficialan lingvon.

“Tio estas unu el la kialoj, pro kiu Esperanto ne povas fariĝi la komuna lingvo de la Eŭropa Unio”, — skribis Orban.

La dua kialo rilatas al la karaktero de Esperanto. Lingvo kiel Esperanto havas malmulte da socia aŭ kultura praktiko lige al ĝia vortrezoro laŭ Orban. “La praktikaj kaj financaj konsekvencoj estas grandegaj por krei, el nenio, kompletajn uzokampojn en artefarita lingvo. Pensu nur pri doganaj kodoj aŭ pri bankrilataj leĝotekstoj, aŭ pri la teknikaj postuloj por prem-imunaj ujoj kun simpla geometria formo, konataj ankaŭ kiel brems-cilindroj”, — daŭrigis la eŭropa respondeculo.

Orban havas ankaŭ trian, pli “personan”, kialon. “Mi ne kredas je pontlingvoj, ĉu Esperanto, ĉu la latina, ĉu la angla”, — konstatas Orban. “La ekesto de pontlingvoj estas historie spontana fenomeno soci-lingvistika, ne rezulto de decidoj leĝofaraj aŭ politikaj”, — li diris, akceptante, ke esperantistoj ne konsentos kun lia starpunkto.

“Kia blindeco! Kiam Orban finfine mencias ion tute validan ... esperantistoj ... reagis kvazaŭ estus evidentaĵo, ke tiaj problemoj en Esperanto ne ekzistas. Male, estas evidentaĵo ke ili ja ekzistegas!” — diris esperantisto laboranta en eŭropa instanco kiel tradukisto. Malgraŭ la “vaneco”, la esperantisto instigas klerulojn tamen fojfoje provi eduki la verdajn “zelotojn”. Alia konata esperantisto, interpretisto ĉe eŭropaj instancoj, havas “nek tempon nek emon” por ĉi afero.

Respondante en januaro al *La Ondo*, Orban jam negative rilatis al la lingvo de Zamenhof: “Ankoraŭfoje, mi estas kontraŭ komuna lingvo. Ni havas tre riĉajn lingvojn kaj ni devas esti fieraj pri niaj lingvoj. Ni devas lerni lingvojn. Mi ne pensas ke ni bezonas neŭtralan lingvon por pli bone komuniki. Ni nun havas eŭron — ununuran monon. Sed la intenco de EU tute ne estas ekhavi ununuran lingvon aŭ kulturon”.

Remush, verda membro de la retforumo en kiu Orban

elpaŝis kontraŭ Esperanto, rimarkis ke Esperanto ja estas tre “fleksebla” lingvo, en kiu estus tre facile krei novajn vortojn. Remush ankaŭ notas, ke la *Esperanta Bildvortaro* enhavas informojn pri bremsocilindroj kaj aliaj teknikaj vortoj. Aliaj esperantistoj antentigis pri la ŝparo, kiun Esperanto ebligis al EU, se ĝi estus enkondukita.

La diskuto daŭris en movada retgazeto *Libera Folio*, kiu petis komenton al István Ertl, tradukisto ĉe la Eŭropa Revizora Kortumo. Laŭ Ertl, Orban ne tute malpravas pri la mankanta vortrezoro de Esperanto. “Estas vero, ke neniu el ni, eĉ ne la plej bonaj konantoj de la lingvo, vivas konstante ĉirkaŭate de Esperanto”, — komentis Ertl, laŭ kiu abundas la kunteksto kie ni ne bezonas uzi, kaj sekve ne “tute glate”, uzas Esperanton.

“Evidente, eblas priparoli en Esperanto paneon de aŭto, staton de bankkonto, organojn de cetacoj, freŝan skandalon de filmstelulo — ĉion ajn, sed principe tio eblas ankaŭ en ĉiuj aliaj lingvoj de la mondo”, — klarigis Ertl al la retgazeto. — “La diferenco kuŝas en tio ĉu oni efektive faras tion — diferencas la efektiva larĝeco de la uzokampoj”. Laŭ Ertl la oficialaj lingvoj de EU estas apogitaj de enorma terminologia laboro kaj plurjardeka tradicio de EU-kunteksta translingvigado. “Kompare al tio, ĉe enkonduko de Esperanto efektive necesus, ĝuste kiel Orban diras, enormaj fortostreĉoj praktikaj kaj financaj”.

Dafydd ab Iago

Nombroj sen komentoj

Amikoj kaj malamikoj de Ruslando

Laŭ opinisondo de Ruslanda Centro pri Esplorado de Socia Opinio (VCIOM) 21% da ruslandanoj kredas, ke la plej amika lando por Ruslando estas Ĉinio, sekvas kun proksimume sama nombro da voĉoj (po ĉ. 12%) Germanio kaj Bjelorusio. La malamikaj landoj estas Usono (26%), Kartvelio (19%), Baltio, Britio, Ukrainio (po ĉ. 7%). 49% da respondintoj ne povis nomi amikojn, 51% ne povis nomi malamikojn. Respondis 1600 personoj en 46 regionoj de Ruslando.

Simila opinisondo en Usono donis jenajn rezultojn: *Amikoj*: Britio (70%), Kanado (57%), Aŭstralio (54%), Israelo (42%); *Malamikoj*: Pakistano (69%), Ĉinio (63%), Kolombio (56%), Ruslando (54%).

Novaj ruslandanoj — 370 mil.

Vicdirektoro de la Ruslanda Federacia Migroservo, Vladimir Kalanda, informis, ke en 2007 la ruslandan civitanecan ricevis 370 mil eksterlandanoj. Nur Usono havis pasintjare pli multajn novajn civitanojn ol Ruslando. Plejparto da novaj ruslandanoj devenas el ekssovetaĵaj landoj — Kazahŝtano, Kirgizio, Bjelorusio.

Ukrainio kaj NATO

25 jan — 2 feb 2008 Ukrainia Opinisonda Fondaĵo esploris la sintenon de ukrainianoj al membriĝo de Ukrainio en NATO. Laŭ la respondoj (2 mil personoj en 160 loĝlokoj), preskaŭ 60% da ukrainianoj malaprobis la membriĝon de Ukrainio en NATO, 16,9% subtenas la membriĝon, 15% ne havas respondon, kaj 8,4% ne partoprenis eventualan tiuteman plebisciton.

Ĉu vodkon?.. Ne, dankon! Bieron!

Laŭ raporto de la Ruslanda Alkohola Asocio (NAA) en 2007 en Ruslando oni trinkis 191,4 mil dkl da vodko, malpli multe ol en 2006 (212,2 dkl). En tio la proporcio de vodko malkreskis de 56,2% en 2006 al 51,1% en 2007. La proporcio de vodko malgrandiĝas ĉiujare ekde 1999. Sed kreskas trinkado de biero: de 971,8 mln dkl en 2006 al 1071,4 mln dkl en 2007. (1 dkl = 1 dekalitro = 10 litroj).

Kunlaboro serĉata

Mi estas 59-jara germana esperantisto, membro de la *Pasporta Servo*. Mi skribas por kontakti intereseulojn pri jenaj aferoj:

1. Mi kolektas uzitajn, afrankitajn leterkovertojn kaj poŝtkartojn, precipe tiajn, kiuj estis senditaj de Germanio al via lando. Ĉio kun rekompenco!

2. Mi estas oficiala peranto por infanartistinoj laŭ la sistemo “au-pair” kaj daŭre serĉadas taŭgajn knabinojn kun meza aŭ minimuma kono de la germana lingvo. Mi petas kontaktojn al koncernaj gimnazioj, universitatoj en via lando.

3. Mi estas adoranto kaj ŝatanto de raraj plantoj, ekzemple, teraj orkideoj. Indiku, se vi konas tiajn lokojn en via ĉirkaŭo (nur en eŭropaj landoj).

4. Mi serĉadas tiel nomatan *Ruĝan libron*, en kiu estas ordigitaj la endanĝerigitaj plantoj de la koncerna lando.

Se vi povas fari proponon pri iu(j) punkto(j), skribu al mi. Bonvolu transdoni mian informon al viaj klubanoj, al aliaj esperantistoj, ankaŭ al neesperantistoj (iom mi scias la anglan, rusan, hispanan, italan).

✉ Brandstr. 21, D-04626 Schmölln, Germanio

✉ mafrajoklaki@freenet.de

Manfred Kirsch (Germanio)

Ĉu aktuala la londona biblio?

Ĉi tie ne interesas la aktualeco de ĝia Esperanto, sed ties adekvateco al la originala teksto. Altiras atenton, ĉi-momente, specifa punkto de tiu adekvatiĝo, atentigita de kulturaj kaj religiaj cirkonstancoj tiutagaj. Ne nur specialistoj pri bibliaj tekstoj kapablas sperte konstati kaj kleriĝi, sen sin senti tro fremdaj, ke el iu versego onin trafas la vortoj “hipostasis/substantia” kaj “élenkos/argumentum” (la unua termino estas greka, la dua latina). Kiel oni tradukus al Esperanto tiujn terminojn?

La skolo laŭ Lutero interpretis la unuan (hipostasis/substantia) ne laŭ objektiva senco (kiel realaĵon ĉeestanta en ni), sed subjektivsence kvazaŭ vortojn, esprimantajn internan sintenon de la kredanto; kaj la duan (élenkos/argumentum) kiel internan dispozicion (oni bonvolu ignori la teologiajn deduktaĵojn el tia duobla interpreto). Al tiu ĉi interpreta tezo finiĝis adheri ankaŭ la nova biblio de la ekumena germana komisiono, kun aprobo kaj de evangeliaj komunumoj kaj katolikaj episkopoj.

Sed jen la novaĵo. En la lasta encikliko (SPE SALVI facti sumus: SAVITAJ ni estis en la Espero) de la nuna papo, en la numero 7a estas dirate ke tiu interpreto “subjektiva”, jam akceptita en tiu ekumena biblio, kvankam en si mem neerara, ne esprimas tamen la tekstan sencon kaj fakte estas jam rifuzita ĝuste de evangelianaj ekzegezistoj.

Temas pri la versego unua de la ĉapitro dek-unua de la Letero al la Hebreoj, kiun ni hastas reprodukti en la Esperanto de *La Nova Testamento* de la Londonaj-Edinburgaj esperantigistoj. Ja, tiuskolaj tradukistoj, kiuj certe konis la kverelon ekzegeza-teologian, kiun kriterion sekvis, ĉu tiun de la subjektiveco aŭ objektiveco? Ili tiel tradukis: “Kaj la fido estas realigo de esperataĵoj, provado de ne vidataj”. Realigo = objektiva realaĵo; provado = montrado-konstato.

La subjektiva tiel sonas: “Fido estas: resti firme en kio esperata, esti konvinkita pri kio nevidata”.

Ĉu ne ŝajnas, ke tiuj niaj antaŭuloj meritas la kuponeton de la moderneco kaj aktualeco?

Armando Zecchin (Italio)

Britujo deklaras militon al la mondo

Ni povas memori la 17an de januaro 2008 kiel la tagon, en kiu Britujo oficiale deklaris lingvan militon al la mondo ne angloparolanta. Milito kiu, duonoficiale, de longtempe estas kondukata.

Armeo da 750.000 instruistoj-militistoj okupos denove Hinduojn, kiu konkeris sendependecon de la brita kolonia imperio en 1947 sub la neperforta gvidado de Gandhi.

Ĝuste Gandhi, kiu en 1908 deklaris “Doni al milionoj da homoj konon de la angla estas kiel sklavigi ilin”, batalis por ke la hinda estu la oficiala lingvo de la lando, brave kontraŭante uzadon de la angla, trudita en Hinduojn koloniitan fare de Britujo.

Tio, kion tiam oni simple estus nominta “koloniismo”, nun, en la vortoj de la angla ĉefministro Gordon Brown, aspektas kiel “donaco” kaj interpreto de “deziroj” de la tuta homaro: “Hodiaŭ mi volas fari al la mondo novan donacon, kiu povas eble helpi homojn, kvankam malriĉajn, lerni, kiel ili deziras, la anglan lingvon”, — deklaris Brown antaŭ ol foriri al Ĉinujo kaj Hindujo, aldonante ke *British Council* estas pretiganta novan grandan interretan portalon por varbado de centoj da miloj da instruistoj de la angla por atingi la plej malproksimajn lokojn de ĉiu kontinento.

Por konigi kiom eble plej multe la deklarojn de Gordon Brown kaj de la direktoro de *British Council* mi disponigis ilin ankaŭ en esperanta traduko: <http://lnx.internacilingvo.org/eo/index.php?newlang=epo>

Giorgio Pagano (Italio)

Peterburgo atendas vin!

Ĉiulandaj esperantistoj, vizitantaj Peterburgon, estas bonvenaj en la gastejo (hostel) *Base Camp*. Ĝi situas en la historia centro de Peterburgo, je nur unuminuta promendistanco de la metrostacio *Sportivnaja*.

En *Base Camp* estas entute kvin ĉambroj kvar-, ses- kaj ok-litaj, kuirejo, komuna salono (*vidu la suban foton*), banĉambro, du duŝejoj, tri necesejoj. Je via dispono estas televidilo, DVD, lavmaŝino, interneto, Wi-Fi.

La prezojn kaj aliajn detalojn vidu en la retejo (www.bchostel.org). La esperantistoj ĝuas 15-procentan rabaton!

✉ Bolŝoj prospekt Petrogradskoj storony, 4-9.

☎ (812) 230 50 87

📞 +7 911 101 35 07

✉ info@bchostel.org, bchostel@nm.ru

Viktor Zaĥarov (Ruslando)



Claude Piron (1931–2008)



La 22an de januaro en sia hejmo en Gland (Svislando) forpasis Claude Piron — unu el la plej elstaraj nuntempaj esperantistoj kaj, eble, la plej ŝatata persono en la nuna Esperantujo.

Claude Piron naskiĝis 26 feb 1931 en Namur (Belgio). Post studoj en Antverpeno kaj Ĝenevo li laboris ĉe UN en

Novjorko kiel tradukisto kaj redaktoro-protokolisto (1956–61) kaj ĉe la Monda Organizo pri Sano en Ĝenevo, Orienta Azio, Pacifiko kaj Afriko (1961–69).

En 1969 li ekpraktikis psikoterapion en Svislando. Li docentis en la psikologia kaj edukscienca fakultato de la Ĝeneva Universitato de 1973 ĝis sia emeritiĝo en 1994. Krom la psikoterapia praktikado li profesie trejnigis junajn psikoterapiistojn kaj verkis tri franclingvajn librojn pri sia fako.

Esperantisto de 1942, en 1958 li kunfondis Esperanto-klubon ĉe UN en Novjorko kaj estis reprezentanto de UEA ĉe UN. En la movado li plenumis plurajn taskojn, interalie, kiel redaktoro de *Svisa Espero*, instruanto de Esperanto, preleganto en pluraj kongresoj kaj renkontiĝoj.

Piron ĉiam pledis favore al Esperanto kiel alternativo al la lingva kaoso en internaciaj organizoj, kies situacion li bone konas de interne; oni spertis lin kiel ardan preleganton kaj interesan rakontanton, kun multaj teoriaj konoj kaj praktikaj spertoj pri psikologio kaj la monda lingva problemo.

Poemojn en Esperanto Piron ekverkis en la 1950aj jaroj kaj gajnis premiojn en Belartaj Konkursoj de UEA, sed famigis lin, kiel verkiston Johán Valano, lia romano *Ĉu vi kuiras ĉine?* (1976), proklamita en 1977 kiel la Verko de la Jaro. Ĝin sekvis kelkaj pliaj romanoj kaj novelaro en la *Ĉu-serio*, poemaro *Malmalice* (1977), romanoj *Ili kaptis Elzan* (1985) kaj *Tien* (1997), novelaroj *Lasu min paroli plu* (1984) kaj *Vere aŭ Fantazie* (1989) kaj tri didaktikaj romanetoj, inkluzive de la furora *Gerda malaperis!* (1983) plurfoje reeldonita kaj adaptita por instruado en apartaj lingvoj, fine ankaŭ kiel filmo (2006).

En siaj beletraj verkoj Piron montris sin ne nur kiel interesa aŭtoro, sed ankaŭ kiel lerta lingvoartisto, uzanta la latentajn de Esperanto kaj evitanta neologismojn. Ĉi tiun lingvan principon li emfazis en *La bona lingvo*, eldonita en 1989 unu jaron post lia eksiĝo el la Akademio de Esperanto; la polemiko pri ĝi ne ĉesas ankaŭ nun. Li verkis ankaŭ diverslingvajn (france, angle, germane, itale, Esperante) librojn kaj broŝurojn pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto, inter kiuj elstaras *Le défi des langues* (1994), kurson pri psikologio (1978); en 1982 aperis lia sonkasedo *Frandu Piron*.

Claude Piron estas laŭreato de la premioj Deguĉi (1994) kaj OSIEK (1998), honora membro de UEA (1998) kaj de SES (2006), sed, eble pli grave, liaj verkoj, kursoj, kantoj, libroj kaj lia helpema sinteno donis al li grandegan popularecon en Esperantujo.

Ni funebras kaj kondolencas.

La Ondo / Andreas Künzli

Parolas Pekino

Laŭ la statistiko en 2007 Ĉina Radio Internacia (CRI) ricevis pli ol 2 milionojn kaj 600 milojn da leteroj kaj elektronikaj mesaĝoj. Inter ili la Esperanto-Redakcio ricevis 6 mil 738 korespondantojn. Ambaŭ nombroj estas novaj rekordoj de CRI.

Ni rimarkis, ke ĉiuj niaj aŭskultantoj laŭeble faris kontribuojn malgraŭ okupiteco. Ili tenas kun ni kompaktan kontakton kaj regule sendas al ni leterojn kaj retmesaĝojn kun aŭskultraportoj, komentoj, aktualaj eĥoj pri la gravaj eventoj en Ĉinio kaj movadaj informoj en diversaj mondpartoj. Ĝuste dank' al tio, nia programo senĉese pliboniĝis kaj nia *Mikrofone* fariĝis pli kaj pli leginda.

Post la resumo ni elektis aparte dankindajn aŭskultantojn, kiuj faris elstarajn kontribuojn en 2007. Ili estas Leopold Patek el Aŭstrio, George Otto Vaske el Brazilo, Angel Ivanov Maglov el Bulgario, Jiří Patera el Ĉeĥio, Chalm Alain el Francio, Anton Kronshage el Germanio, Joop van der Hoeven el Nederlando kaj aliaj. Kun dankemo ni sendas al ili modestan donacon por memoro kaj kuraĝigo.

Esperanto-Redakcio de CRI

Desmet libera, ĉu definitive?

En la februara *Ondo* ni informis, ke 17 dec 2007 konata belga esperantisto estis arestita pro akuzo pri seks-atenco. Post kelkaj semajnoj en prizono 1 feb 2008 li estis “kondiĉe liberigita”.

Temas pri Petro (Pierre) Desmet, aktivulo en la nederlanda kaj belga movado. Per 27 leteroj el prizono (kaj per kelkaj “el provizora libereco”) li rakontas en sia blogo (http://www.ipernity.com/blog/petro_desmet/home) pri la afero, kiun kaŭzis psike malsana junulino, denunciinta lin pri sekskrimoj, faritaj antaŭ kelkaj jaroj dum liaj muzik-lecionoj. La akuzo montriĝis nesufiĉe motivita.

Ne estas klare, ĉu okazos proceso, aŭ la kazo estos fermita pro manko de pruvoj.

Laŭ www.ipernity.com

21 jan 2008 en Kolomna forpasis pro pulmokarcero

Leonid Borisov (1946–2008)

esperantisto ekde 1962, populara kantisto en la sovetunia junulara Esperanto-movado.

27 jan 2008 en Martinez (Kalifornio) post pli ol dujara batalado kontraŭ kancero forpasis

Donald J Harlow (1942–2008)

esperantisto ekde 1959, aktivulo de la usona movado, en kiu li plenumis funkciojn de direktoro (1879–1983, 2005–2007), sekretario (1984–1986), prezidanto (1994–1996) de la landa asocio kaj de redaktoro de ĝia organo (1987–1995). Li starigis popularan retejon pri la Esperanto-literaturo. Laŭreato de premio Deguĉi (2003), kaj de UEA-diplomo pro elstara agado por Esperanto (2007).

28 jan 2008 en Kaŭno forpasis

Ericas Laiconas (1928–2008)

luterana pastro, esperantisto ekde 1958, aktivulo de LEA kaj de KELI, fondinto kaj redaktinto de la revueto *Litovia Kristano*.

3 feb 2008 en Montpellier forpasis

Léon Lentaigne (1909–2008)

esperantisto ekde 1930, aktiva Freinet-instruisto kaj SATano, instruanto de Esperanto, aŭtoro de lerniloj kaj de du popularaj frazeologiaj vortaroj *Kiel diri?* kaj *Tiel diru!*

La landnomoj en Esperanto kaj la diskuto ĉirkaŭ la naturo de “sufikso” -i

Eseo de Marc Bavant



La sistemo de landnomoj en Esperanto kaŭzis multajn polemikojn, precipe pro la proksimeco de tiu temo kun ideologiaj valoroj, i.a. naciismo, kiujn diversaj esperantistoj perceptas malsame, kaj ankaŭ pro la hezitaj de la unuaj aŭtoroj. Aparte simptoma de tiu problemo estas la III-a kajero de *Aktoj de la Akademio* 1975–1991: ĝi ŝajnas montri, ke dum tiom da jaroj la Akademio de Esperanto laboris nur pri tiu marĝena problemo, tamen ne sukcesante konvinki ĉiujn esperantistojn pri la praveco de kelkaj siaj rekomendoj. Alia fonto de disputo estas pli specife lingva kaj koncernas la fakton, ke la landnomajn formojn kun oficiala sufikso **-uj** oni emas pli kaj pli anstataŭigi per aliaj, prezentantaj iun derivilon **-i**, kies naturo restas por difini¹.

La du kategorioj

Se oni studas la lingvon tia, kia ĝi estas, ne eblas ne rimarki, ke en ĝia sistemo de landnomoj aperas du kategorioj: la unuan ilustras la nomo *Kanado*, ne derivita, de kiu deriviĝas la adjektivo *kanada* (rilata al la lando Kanado), kaj la substantivo *kanadano* (loĝanto de Kanado); la duan ilustras la nomo *Rusujo*, ekzistanta ankaŭ sub la formoj *Rusio* kaj *Ruslando*, ĉiuj tri evidente derivitaj de la genta radiko **rus**.

Marc Bavant naskiĝis en 1957 en Pariza ĉirkaŭurbo. Franco, inĝeniero, laboras en la kampo de komunik-retoj en Parizo. Esperantisto ekde 1980, instruas Esperanton rete kaj okupiĝas pri leksikografio kadre de la projekto REVO. Membro de la Akademio de Esperanto kaj direktoro de ĝiaj sekcioj *Faka lingvo* kaj *Kontrolo de lernolibroj*.

Verkoj: *Les bases de l'espéranto* (2002), *Matematika vortaro kaj oklingva leksikono* (2003).

Por la landnomoj de la dua kategorio la responda adjektivo povas alpreni plurajn formojn: aŭ derivitan rekte de la gentonomo (*rusa*), aŭ de la landnomoj (*rusuja*, *rusia*, *ruslanda*). Same koncerne la loĝantonomojn: *ruso*, unuflanke, kaj *rusujano*, *rusiano*, *ruslandano*, aliflanke. Evidente inter la formoj derivitaj de la gentonomo kaj tiuj derivitaj de la landnomoj ekzistas senconuancoj, aluditaj i.a. de la Fundamento (FE §37: *Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj*), sed la interpreto de tiuj nuancoj povas dependi de la koncerna lando aŭ de la parolanto, do entute de tikla ideologia kunteksto². Tial la *Akademio*, ekde sia decido de 1985, preferas rekomendi, ke oni ignoru tiajn nuancojn.

Subtilaĵoj

Komplikas la analizon la fakto, ke la landnomoj de la unua kategorio ne ĉiuj estas same klare unuradikaj kiel *Kanado*. En tiu kategorio ekzemple ne mankas vortoj, finiĝantaj per la elemento *land*, kiel *Irlando*, *Islando*, *Nederlando*, *Gronlando*... Tiujn unuajn oni povas sen tro da disputoj konsideri ne kunmetitaj, kvankam iuj aŭtoroj ne hezitas uzi la formon *Nederio*³, lando supozeble loĝata de “nederoj” kaj de nenederaj nederianoj, kiun nuancon iuj povas trovi mirinde utila... sed sen kiu tamen bone vivas *Kanado* kaj plimulto el la terglobaj landoj! Aliaj nomoj finiĝantaj per *land* havas malpli klaran karakteron. Ekzemple *Togolando* povus esti kunmetaĵo el *Togo* (nomo de vilaĝo en tiu lando), sed ĉu *Togo* vere estas vilaĝa nomo en Esperanto? Kontraste, *Kongolando* (kiun la *Akademio* nun preferus nomi *Kongo*, post kelkjara rekomendo de *Kongolo*) estas pli evidenta kunmetaĵo, nome de la riveronomo *Kongo*. Eĉ se kunmetitaj, tiuj

du nomoj tamen apartenas al la unua kategorio, ĉar la flankelemento ne montras genton, sed ian geografian apartaĵon. Same la landnomoj derivitaj pere de la derivilo **-i** de iu negenta radiko, kiel *Alĝerio*, derivita de la urbo *Alĝero*, aŭ *Niĝerio*, de la rivero *Niĝero*, estas konsiderataj unuakategoriaj.

Ni krome menciui, ke al la unua kategorio oni alkalkulas ankaŭ la plurvortajn sintagmojn kiel *Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj*, *Demokratia Respubliko Kongo*, aŭ la kunmetaĵon *Nov-Zelando*. Tamen pri sintagmoj, kies kerno konsistas el almenaŭ unu duakategoria nomo, kiel *Sauda Arabujo*, *Bosnujo kaj Hercegovino*, aŭ iu fikcia *Umujo kaj Zozujo* (afable sugestita de kol. Wennergren), eblas dubi, al kiu kategorio oni ilin alkalkulu. Efektive, ĉu troviĝas gentonomo por nomi iliajn loĝantojn? Ja la termino *saud-arabo* ŝajnas ebla por la unua, sed ĉu akceptebla de la koncernatoj? Kaj se *bosno* taŭgas por la dua, kiel sugestas la uzado, oni sin demandas, kial la lando ne nomiĝas nur *Bosnujo*. La afero de *Umujo kaj Zozujo* cetere memorigas pri la iamaj *Ĉeĥoslovakujo* kaj *Jugoslavujo*, loĝataj respektive de ĉeĥoslovakoj kaj jugoslavo, kiuj tamen ne konsideris sin apartenantaj al unu respektiva gento.

Alia problemo de la dua kategorio ligiĝas al la diversaj ekvivalentaj formoj. Ekz-e, kvankam *Rusujo*, *Rusio* kaj *Ruslando* estas ĉiuj tri en vasta uzo, oni malpli facile trovos spurojn de *Itallando*. Tion oni prave klarigas per nacilingva influo, sed kiam tiu influo praktike malpermesas uzi unu el la potencialaj formoj, kiel estas por la nur teorie ekzistanta *Tajio/Tajujo*, oni rajtas demandi sin, ĉu oni klasis la nomon en la ĝustan kategorion, ĉu vere la koncerna gentonomo estas sufiĉe atestita.

Nebula terminologio

En la supra teksto ni senĝene diris, ke la vortoj *Rusio* kaj *Alĝerio* estas derivitaj. Ĉu tial eblas aserti, ke la derivilo **-i** estas sufikso? Sendube jes, sed tion farante ni metas nian diskurson en la kadron de difinita terminologia kadro. Necesus ne lasi tiun kadron implicita, kaj krome demandi sin, ĉu ĝi taŭgas por la publiko de nia teksto kaj por la priparolata en ĝi lingvo. Ĉu ni alparolas neesperantistajn lingvistojn per konfidenca artikoleto pri ekzotika por ili lingvo, ĉu la vastan legantaron de la *Ondo* per popolkleriga eseeto, aŭ ĉu la tutan Esperantan popolon per oficiala decido de la *Akademio*? Tiun demandon oni ne rajtas neglekti.

Cetere, ĉu la terminoj *prefikso*, *sufikso*, *afikso* havas internacie agnoskitan difinon inter la lingvistoj? Ĉu la termino *morfemo*, kiun oni povas uzi por difini *afikso*, estas absolute preciza? Ĉu la disdivido de vorto en morfemojn estas farebla nur unumaniere? Ĉu la nuanco inter *afikso*, *radiko* kaj *finajo* estas por ĉiuj la sama? Ŝajnas, ke al tiuj demandoj ne eblas respondi jese. Ni ne provos solvi la aferon ĉi tie, sed petas la leganton memori pri tiu terminologia nebuleco kaj pri la kunteksta graveco.

Provoj por oficialigo de -i

Sufiĉe frue disvastiĝis en Esperanto la emo uzi derivilon **-i** anstataŭ **-uj**, kaj eĉ uzi ĝin por ĉiuj landnomoj, kiel universalan karakterizilon (ekz-e **Nepalio*, **Kanadio*). La motivoj por tio estis kaj ideologiaj (forigo de la naciisma postgusto de la degentaj nomoj), kaj lingvaj (prefero por naturalismaj formoj). La demando estis submetita al la *Akademio* jam en 1922, sed ĉi tiu malkonsilis uzi la novan sufikson. En 1974, sub prezidanteco de A. Albault, ĝi tamen nuligis sian malkonsilon, konstatinte, ke “la okazo de la sufikso *-io* apud la Fundamenta *-ujo* por ricevi pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de [la Fundamenta metodo de arĥaismo]”.

Iuj iris pli malproksimen en akcepto de la nova sufikso. Sufiĉas konsulti la plej aŭtoritatan vortaron de Esperanto, nome PIV-on: jam en 1970 ĝi prezentas la nomon *Italio* sub la kapvorto **Ital/o** kiel *~io*, *~ujo*, do kiel evidentan, samstrukturan sinonimon de la Fundamenta derivaĵo. En la sama verko la sufikso **-i** aperas kapvorte kun jena difino:

Internacia sufikso uzata: **1** por formi landnomojn **a)** el la nomo de ĉefurbo aŭ rivero; **b)** el la


onomo de loĝanta popolo; **2** por formi sciencajn nomojn **a)** montrantajn scienccon el la nomo de la sciencisto, **b)** montrantajn teknikon el la nomo de la karakteriza instrumento.

Ni notu, ke nur la signifo **1b** (ekz-e en *Italio*) sinonimas kun tiu de **-uj**, kiam uzata por formi landnomojn, kaj efektive la plej prudentaj nuntempaj pledantoj por oficialigo de **-i** limiĝas al tiu ununura signifo, agnoskante, ke la uzoj de **-i** kun la signifoj **1a** (ekz-e en *Tunizio*) aŭ **2** (ekz-e en *biologio* kaj *mikroskopio*) rezultas ne el propre Esperanta deriva procedo, sed el prunto de nacilingvaj radikoj, prezentantaj iun hereditan sufikson **-i** pro etimologiaj kialoj, dum aliaj similaj vortoj povas prezenti ne-Esperantan sufikson: ekz-e *land* en *Irlando* (ne *Ir/i/o*) aŭ *istik* en *lingvistiko* (ne *lingv/ist/i/o*).

Tri “skoloj”

Oni do vidas, ke la kerno de la demando konsistas en tio, ĉu oni konsideru la **i**-formojn kiel Esperantajn derivaĵojn, t.e. formitajn el Esperanta radiko kaj sufikso **-i** (do *Ital/i/o*, *biolog/i/o*), aŭ kiel nederivitajn (do *Itali/o*, *biologi/o*), kvankam sence kaj etimologie ligitaj kun la radikoj **ital** kaj **biolog**. Tiu kriterio ebligas distingi tri “skolojn”, pompe dirante: **A)** tiuj, kiuj akceptas kaj *Ital/i/o*, kaj *biologi/o*; **B)** tiuj, kiuj akceptas nur *Ital/i/o*, eventuale kun subskolo de la akceptantoj de *Tuniz/i/o*; kaj **C)** tiuj, kiuj akceptas neniun el tiuj derivaĵoj.

La anoj de skolo **A** kutime ne limiĝas al akcepto de la sufikseco de **-i**. Ili ŝajne opinias, ke ĉiu greklatina vortfara elemento (vortfarilo) havas sian lokon en Esperanto. La postulatoj de tiu skolo



klarigas, kial en PIV2002 aperas formoj kiel *hemo/glob/in/o* aŭ *bi/jekci/o*, kaj kial, pro ili, devas ekzisti la uzataj de neniuj kapvortoj *hemo/o*, signifanta ruĝan sangoĉelon, kaj *jekci/o*, signifanta bildigon. Ekstremistoj de tiu skolo konsideras kiel afiksojn eĉ *in-*, *ob-*, *kon-* (ekz-e en *kon/klud/o*), *epi-* (ekz-e en *epi/derm/o*), *-enc* (ekz-e en *konfer/enc/o*) ktp⁴.

La anoj de skolo **B** agnoskas, ke preskaŭ ĉiuj formoj akceptataj de **A**-skolanoj estas fremddevenaj, kaj ke ilia ŝajna kunmetiteco devenas de etimologio. Ili tamen konstatas, ke, en sia landnoma uzo, sufikso **-i** kondutas produktive ene de Esperanto, kiel pruvas vortoj *Ĉin/i/o* aŭ *Brit/i/o*, havantaj neniun bazon ekster Esperanto.

La anoj de skolo **C**, al kiu ni apartenas, rekonas la pravecon de la argumentoj de **B**-skolanoj, sed plu rifuzas konsideri **-i** kiel sufikson, ĉar ili baziĝas sur la historio de la lingvo kaj sur specifeco de Esperantaj morfemoj akcepti memstaran uzon, se nur ili havas leksikan signifon.

Kial -i ne estas sufikso

Bone konata estas tiu citaĵo el la *Unua Libro*⁵:

Mi aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke [...] la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj ktp. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj [...] mi tute alkonformigis tiun ĉi *dismembrigon* de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj tiel, ke [...] la *dismembrigo* de la lingvo neniam embarasas la lernanton; li eĉ ne suspektas, ke tio, kion li nomas *finiĝo* aŭ *prefikso* aŭ *sufikso*, estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel vorto radika aŭ kiel gramatika parteto.

Notinte, ke la Zamenhofa termino *vorto* plene respondas al nia hodiaŭa *morfemo*, oni klare komprenas el la citaĵo, ke uzante terminojn *finajo*, *prefikso*, *sufikso* aŭ *radiko* rilate al Esperanto, oni fakte ŝminkas la realon de izola lingvo per eŭropaj nocioj. Ni tamen ne estu tro naivaj kaj rekonu, ke tiu prezento de Esperanto kiel kodlingvo, kvankam ĝi

parte respondas al la realo, tamen certa-grade estis propaganda truko. Sed la truko bone funkciis, enradikiĝis en la mensso de la parolantoj, kaj sekve de tio disvastiĝis memstara (t.e. radika) uzado de la morfemoj, kiujn en tradiciaj gramatikoj oni nomas afiksoj aŭ afiksoidoj, kiel pruvas *ano, eta, ulo, ino, gea, inda* ktp⁶. Tio ne implicas, ke la signifoj de la afikse uzataj afiksoj tute identas kun tiuj de la radike uzataj: ja Italujo ne estas ujo, same kiel ronĝulo ne estas ulo, aŭ — tute simile — la Fundamenta *norda cervo* ne estas cervo⁷!

Sed, revenante al skolo **A**, eblas veti, ke ĝiaj fremdaj vortfariloj (ekz-e **hemo, hemat, foto**⁸, **olog, in, it**...) neniam sendependiĝos en praktiko, aŭ se ili tion farus, severe endanĝerigus la sistemon de Esperanta vortfarado kaj ĥaosigus ties fakvortprovizojn. Eĉ se oni akceptas la ideon, ke, ĉar sendependiĝo de la afiksoj okazis laŭstape, diakrone, tiel povus okazi ankaŭ kun nove enkondukitaj afiksoj, restas, ke tio neniam okazos kun **-i**, ĉar neniam oni povos diri “la ianoj de tiu io” anstataŭ “la loĝantoj de tiu lando”!

Ni do rifuzas, ke la *Akademio* nomu en nova teksto destinita al la ĝenerala Esperanto-publiko la vortfarilon **-i** per la ŝajne sendanĝera termino sufikso. Se oni tion farus, oni subkomprenigus, ke **-i** estas morfemo, kiu, kvankam ĝi enhavas leksikan signifon, tamen ne akceptas radikan uzon. Oni tiel malfermus la pordon al aliaj tiaj neregulaj “morfemoj”: baldaŭ enirus la lingvon la tuta inter-

nacia afiksaro kaj, pli grave, ankaŭ la lavango da novaj afiksoj, kiujn iu iam ial elpensis: ekz-e la sufikso **-j**, elpensita de R. Eichholz... por la *sendependaj* ŝtatoj (ekz-e *Italjo*), aŭ la sufikso **-jer**, destinita anstataŭ **-uj** en ties arba signifo (*bananjero*).

Multe pli prudente estus

(1) nomi afiksoj nur la oficialajn, esperante ke la filtrilo de Akademio oficialigo kapablas ŝirmi la lingvon kontraŭ la unutagaj elpensajoj, kaj

(2) konservi apartaj por la celoj de scienca terminologio la bazan Esperantan vortfaran sistemon, unuflanke, kaj la “internacian” sistemon, aliflanke.

Por konservi la apartecon sufiĉus precizigi, ke la dua sistemo produktas ne vortojn, sed kompleksajn, analizeblajn radikojn, laŭ la modelo de hereditaj sciencaj terminoj (**bio|logi**), aŭ laŭ tute interna modelo, produktanta pure Esperantajn radikojn, kiel **brit|j, ĉin|j, pe|ĉj**, aŭ en alia kampo **mega|om** (anstataŭ la heredita **megom**), **foto|ĉel** (el la internacia elemento **foto, lumo**, kaj la esperanta radiko **ĉel**) ktp.

Ni esperas, ke per tiu artikolo ni kontribuis al pli vasta kompreno de la delikata landnoma sistemo, pri kiu cetere la *Akademio* plu laboras por eldoni liston de rekomendataj formoj⁹. Aldone ni provis konsciigi la leganton pri la neceso distingi la diversajn vortfarajn tavolojn de la lingvo por teni ties prastrukturon firma.

Notoj

1. Kontraŭuloj de tiu tendenco tamen komencas laŭtigi la voĉon, kiel montras la laste aperinta *Rusoj loĝas en Rusujo*, redaktita de A. Löwenstein, aŭ *La landnoma sufikso -ujo en instruado* de B. Wennergren, publikigita en la reta *Lingva Kritiko*.

2. Ekzemple, la uzo de “francoj” en la Fundamenta ekzemplo dubindigas, ĉu per ĝi Zamenhof volis aludi al la ruslanda plurnacieco: ja francoj povas laŭokaze loĝi en Rusujo, sed ne konsistigas tie nacian malplimulton, kompareblan kun tiuj de judoj, ĉuvaŝoj, tataroj k.a.

3. N. Gudskov: *Epitomo de Esperantologio*. http://fr.lemu.net/biblioteko/pri_esperanto/epitomo/epitomo.pdf

4. J. Werner: *Terminologia kurso*. http://eventoj.freeweb.hu/steb/ĝenerala_naturscienco/terminologio/terminkurs.htm

5. Ni citas el la *Fundamenta Krestomatio*, kun tre ampleksaj tranĉoj.

6. Estas konate, ke la sufiksoj *nj* kaj *ĉj* estas ĉiel esceptaj: ili komenciĝas per konsonanto kaj kripligas la antaŭirantan radikon. Kvankam estis provoj enkonduki radikan uzon de ili (*njo-knabo, ĉjoĉjo-nomo*), ni pli volonte konsiderus, ke ne temas pri plenrajtaj morfemoj. Ne estas problemo por ni diri, ke **petr** kaj **peĉj** estas malsamaj radikoj. Ni krome aldonu, ke la pure gramatikaj morfemoj tre malvolonte povas sendependiĝi, kvankam estas konataj provoj uzi memstare la morfemon *o* (kun la signifo *objekto*) kaj la verbajn finaĵojn (kun la signifo de *esti*).

7. Tiun ekzemplon ni donas speciale por refuti la strangan aserton de A. Albault en sia cirkulero pri “La vera naturo de la sufikso **-i**” (Aktoj III, p. 47), kvazaŭ la landnoma **-uj** ne estus sufiksoido, sed pseŭdosufikso, ĉar lando ne estas ujo. Cetere tio kontraŭas la instruon de PAG.

8. Ĉi tie temas pri la scienca vortfarilo **foto** signifanta lumon, ne pri la normala vorto *foto*.

9. Tial la artikolo reeĥas elementojn el la diskuto okazinta ĉi-okaze en la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro. La aŭtoro dankas al la sekcianoj nerekte partoprenintaj en ĉi tiu artikolo.

Belartaj konkursoj 2008

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA invitas partoprenantojn por la 59-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 93-a Universala Kongreso en Roterdamo.

Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj en ajna formo. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksitita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 karakteroj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksitita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo “Lingvoj: trezoro de la homaro”. Premio “Luigi Minnaja” kaj du aliaj premioj.

Filmo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo. Daŭro 15–60 minutoj. Tri premioj.

Infanlibro de la jaro: Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en 2007. Unu premio.

La branĉo **Kanto** ĉi-foje ne okazos.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo oni sendu ilin en unu ekzemplero; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Principe ĉiuj konkursaĵoj, escepte de infanlibroj kaj filmoj, akcepteblas rete.

Ĉiuj alvenu plej laste 31 mar 2008. Por filmo oni sendu po unu ekzempleron ĝis 1 jul 2008.

Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; rete: michela.lipari@tiscali.it. La konkursaĵoj (krom infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta retmesaĝo aŭ koverto, se oni sendas la tuton poŝte. Se eble, oni sendu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkuras aŭ instrukciu debetigi propran UEA-konton per la sama valoro.

Premioj: Unua premio: 230 eŭroj; dua premio: 161 eŭroj; tria premio: 92 eŭroj; Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 161 eŭroj; Infanlibro de la Jaro: 483 eŭroj.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Belartaj Konkursoj.

GK UEA

Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (6)

polen/o. Subtila flava polvo, kiu estas produktata de virseksa organo de floro, kaj kiu transportite al aliaj floroj (pere de vento, akvo, insektoj aŭ aliaj bestoj) servas por la reproduktado de la kreskaĵo.

polp/o. Okbraka mara molusko, kapopiedulo kun po unu aŭ du vicoj da suĉiloj sur la brakoj. (*Eledona, Octopus* k.a.)

prestig/o. Bona reputacio: *la Kongreso levos la prestiĝon de nia afero en la okuloj de la mondo; la kompanio perdis sian prestiĝon pro la trompo.*

prestig/a. Havanta prestiĝon; donanta prestiĝon al la posedanto, ricevinto, faranto k.s.: *prestiĝa universitato; prestiĝa verko; prestiĝa aŭto; prestiĝa premio; prestiĝa ago.*

prostat/o. Glando de viro kaj de multaj vir-mamuloj, troviĝanta ĉe la veziko, kaj produktanta parton de la sperma likvo.

protein/o. Substanco, kiu estas (apud sukeroj kaj grasoj) ĉefkonsistaĵo de ĉiuj vivaĵoj, kaj grava parto de la manĝaĵoj de homoj kaj bestoj, konsistanta precipe el karbono, oksigeno, azoto, hidrogeno kaj sulfuro: *ovoblankaĵo enhavas proteinojn kaj akvon.*

pub/o. La malsupra parto de la ventro, ĉe plenkreskuloj normale kovrita de haroj, kovranta la antaŭan parton de la koksosto. **pub/ost/o.** Antaŭa parto de la koksosto.

pulp/o 1 Fruktoĉarno. Mola, karneca parto de frukto aŭ legomo. **2** Kunte-niĝema maso de mola vegetaĵa materio: *pulpo de sukerbetoj; ligna pulpo* (el kiu oni faras paperon). **3** Mola aŭ duonmola parto de kelkaj organoj: *denta pulpo* (= interna parto de dento); *liena pulpo*.

pund/o. Monunuo de Britujo k.a. landoj: *ĝi kostas dek pundojn kaj kvindek pencojn.*

radar/o. Aparato, kiu ebligas ekkoni karakterizaĵojn de la pozicio kaj rapido de objektoj per reflektiĝo de elektromagnetaj ondoj.

radiograf/i. Fotografi (ekz. organon) per iks-radioj: *radiografi pulmojn.*

raked/o. Plata pilkobatilo, konsistanta el kadro kun reto de interplektitaj streĉitaj ŝnuroj, kaj kun longa tenilo, uzata en teniso kaj similaj sportoj.

reĝisor/o. Enskenigisto. Persono, kiu respondecas pri la arta formado de teatraĵo, filmo k.s., kaj kiu gvidas la aktorojn ktp. dum la provoj, filmado k.s.

rezoluci/o. Formala, ofte decida aŭ

Ade

decidigocela, opiniesprimo pri difinita temo, spegulanta opinion de la plimulto inter la anoj de iu fakta aŭ principa kunveno, konstatitan per voĉdono aŭ alia publike kontrolebla metodo, kutime post debato en tiu kunveno pri la temo.

robot/o 1 Maŝino kapabla obei difinitajn ordonojn pri la maniero moviĝi kaj plenumi taskojn, uzata ekz. en fabrikoj por anstataŭi profesiulon en maniero pli efika, malmultekosta aŭ sendanĝera. **2** (en fikciaj verkoj) Maŝino, plej ofte simila al homo (aŭ besto), kapabla pensi kaj agi memstare. **3** (figure) Komputila programo kapabla esplori komputilan reton kaj trovi en ĝi petitajn informojn.

ronĝ/i. Per la dentoj mordet(adj) forigante pecetojn: *ratoj ronĝas la meblojn; sciuroj ronĝas; mi iom ronĝis la biskviton.* **ronĝ/ul/o.** Tia mamula besto kiel ekz. muso, rato, hamstro, kastoro, sciuro aŭ histriko, kiu havas po du grandajn ĉizilformajn tranĉodentojn en la supra kaj malsupra makzeloj. (*Rodentia*.)

rotaci/i. Turniĝi ĉirkaŭ interna akso aŭ punkto: *la tero rotacias unu fojon en 24 horoj; la karuselo rotacis rapide.*

rulet/o. Hazardludo (ofte ludata en kazinoj), en kiu la gajniga numero estas montrata per halto de globeto sur unu el la fakoj de horizontale turniĝanta rado.

saksofon/o. Blovinstrumento precipe ĵaza, militista kaj dancorkestra kun anĉo kaj plej ofte S-forma metala (latuna) tubo.

salikok/o. Malgranda senvertebra akvobesto, dekrura krustulo. (*Pandalus, Leander, Crangon, Paeneus* kaj parencaj genroj.)

satelit/o 1 Astro riviluanta ĉirkaŭ pli granda astro. **2** Artefarita objekto riviluanta ĉirkaŭ la tero (aŭ alia astro). **3** (figure) Urbo, regno aŭ organizaĵo politike aŭ ekonomie dependa de alia urbo/regno/organaĵo. **4** (figure) Fihelpanto tute dependanta de iu; nedisiĝa fikunulo, al kiu oni komisiis krimajn aŭ malnoblajn taskojn.

sesi/o 1 Periodo de kunsidoj de parlamento, asembleo, juĝa instanco, komisiono k.s.: *ordinara sesio; eksterordinara sesio; la aŭtuna sesio de la*

parlamento; la ekzamena sesio daŭros de la 11a ĝis la 25a de Junio. **2** Serio de universitataj prelegoj.

silici/o. Ĥemia elemento, nemetalo bruna (en stato nekristala) aŭ nigre griza (en stato kristala). Simbolo Si, atomnumero 14, atommaso 28,09.

skan/i. Plene kaj laŭorde ekzameni, punkton post punkto, parton de spaco aŭ surfaco: *skani la ĉirkaŭon per radaro; skani libron kaj fotografaĵojn per skanilo por prilabori ilin per komputilo.* **skan/il/o.** Aparato por skani, precipe por ciferecigi optikajn bildojn.

skeĉ/o. Mallonga sceno, kutime komika aŭ satira, prezentata de unu aŭ pluraj aktoroj, kaj kompleta en si mem.

skolt/o 1 Soldato, ŝipo, aviadilo k.s. elsendita por kolekti informojn pri la pozicio aŭ forto de la malamiko, pri la irota vojo (de armeo), k.s. **2** Ano de la skolta movado, internacia junulara movado fondita en Anglujo en 1907. **skolt/ism/o.** La idearo de la skolta movado; tiu movado mem.

specif/i. Nome esprimi, detale difini, precize mencii: *specifi postulojn; specifi regulojn; specifi celojn.* **specif/a.** Havanta ecojn karakterizajn aŭ unikajn por unu individuo aŭ unu klaso; propra al individuo aŭ klaso: *la specifa stilo de pentristo* (la stilo karakterizas ĝuste tiun pentriston); *la specifaj formoj de unu klaso de bestoj* (nur tiu klaso havas tiujn formojn).

spekt/i. Atenti per vido, kaj eventuale ankaŭ per aŭdo, tion, kio estas prezentata: *spekti filmon; spekti operon; spekti teatraĵon; spekti baleton; spekti sportan festivalon.*

stabil/a 1 Ema firme restadi en sama pozicio aŭ stato: *stabila konstruaĵo; stabila situacio; stabila paco; stabila solvaĵo; stabila elemento.* **2** Ŝanĝiĝanta aŭ evoluanta (nedraste kaj ne tro rapide) en glata, unudirekta, ekvilibra kaj antaŭvidebla maniero: *stabila kresko; stabila evoluo; stabila ekonomio.*

stagn/i 1 (pri likvo) Restadi senflua (kaj tial fariĝi malpura kaj malagraba): *akvo stagnis en truoj ĉe la flanko de la vojo.* **2** (pri agadkampo, entrepreno k.s.) Restadi senmova, senaga, malaktiva, ne evoluanta, ne progresanta k.s.: *la komerco stagnas; la ekonomio stagnis; la movado stagnis; la membronombro stagnas.*

statut/o. Fundamenta regularo de organizaĵo.

Daŭrigota

Originala poezio

Hasano Ntahonsigaye (Burundio)

La homo, kiu vin similas

*Mi frapis je via pordo
Mi frapis je via koro
Por havi bonan liton
Por havi bonan fajron
Kial repuŝi min
Malfermu al mi, mia frato
Kial demandi min
Se mi estas el Afriko
Se mi estas el Ameriko
Se mi estas el Azio
Se mi estas el Eŭropo
Malfermu al mi, mia frato
Kial demandi min
Pri longeco de mia nazo
Pri dikeco de mia buŝo
Pri koloro de mia haŭto
Kaj pri la nomo de miaj dioj
Malfermu al mi, mia frato.
Mi ne estas nigrulo
Mi ne estas ruĝulo
Mi ne estas flavulo
Mi ne estas blankulo
Sed mi nur estas homo
Malfermu al mi, mia frato.
Malfermu al mi vian pardonon
Malfermu al mi vian koron
Ĉar mi estas homo
La homo de ĉiuj tempoj
La homo de ĉiuj ĉieloj
La homo kiu vin similas.*

Ludmila Orajevskaja (Ukrainio)

*Sur arbo jam tremas la lasta foli'
Simile al not' adiaŭa de l' suno,
Akord' de la lum' estingata de nuno...
Kaj akras la pura aero-magi'.
Penstras kun ĝi en animon angor',
Kaj tremas la kor' kaj folio aŭtuna...
La temp', forgesita en ŝtorma fortuno,
De l' tago al tag' proksimiĝas la for'.*

Paŭlo Mojajev (Ukrainio)

Simplarimaĵo

*En mia menso — Pri via ĉarmo,
La sama penso: Pri via varmo,
Pri via belo, Pri nia sido,
Pri via helo, Pri via rido...
En mia menso —
La sama penso:
Pri mia miso,
Pri nia diso...*

Ĉi-paĝe ni prezentas kelkajn premiitajn kaj laŭde menciitajn poemojn el nia tradicia literatura konkurso *Liro* en la branĉo *Originala poezio*.

Dimitrije Janičić (Serbio)

Ripetita renkontiĝo

*La jaroj pasis...
Iam ni estis daŭre kune.
Arĝento de tempo nebuligis
bluajn noktojn de nia juneco.
Roza burĝono de lipoj ŝiaj
pli konata ol mia propra korpo
dronis en herbon de forgeso.
Mi iam vivis
en lando de flama poezio,
ŝia amo fajris en miaj vejnoj,
nin vekis kanto de birdoj
kiuj kantis nian sopiregon.
La jaroj pasis...
Ni denove renkontiĝis.
Kiam vitraj makzeloj de pordo
jetis ŝin antaŭ min
laca de fremdaj sopiroj
kaj de propra daŭro
ĉio mallaŭtiĝis.
Niaj okuloj ne povis kredi
ke vinbero fariĝis vino
sed niaj okuloj kiuj ne maljuniĝis
hardiĝis kiel gruzo.
La aero subite fariĝis
dura de surprizo.
Minutoj kiel glutoj plumbaj
fluis inter niaj fingroj
kvazaŭ arĝenta akvo.
Maljuneco
fresta kiel stomako de serpento
ektimigis iaman sopiregon
rompante ŝnuregon de amo
kiu sufokas niajn korojn.
La tago estis frida kiel mokrido
Mi malamus ŝin
se mi ne tiom amis iam ŝin.*

Blazio Vaha (Hungario)

Estas superflue

*Kial verki ion belan?
Nur la ritmo estu ĝusta!
Se pri l' rim' mi ne eraros,
jam la laŭdo estos justa!
Kial diri ion veran?
Nur la rimo estu bona!
Se du rimoj kunsonoros,
ŝajnos jam la strof' impona!
Kial verki poemetojn?
Tio ja ne havas sencon!
Eblas ankaŭ proze diri,
se vi volas, la Esencon.
Kial verki Esperante,
sen esperi eĉ eldonon?
Uzu l' anglan aŭ l' hispanan,
gajnos eble vi eĉ monon!
Kial oni eĉ parolu?
Oni povas simple ... bati!
Se l' batat' rapide mortos,
ne necesos eĉ kompati.*



Fundamenta Krestomatia

Post jaroj da stagnado, komence de la 20a jarcento Esperanto komencis disvastiĝi en Eŭropo. Estis eldonitaj lernolibroj kaj vortaroj en pluraj lingvoj. Ili montris la regulojn de la lingvo kaj la plej necesajn vortojn, sed ankoraŭ mankis libro, kiu povus servi, laŭ koncepto de Zamenhof, “kiel modelo de esperanta stilo kaj gardi la lingvon de pereiga disfalo je diversaj dialektoj...”

Tiun breĉon plenigis *Fundamenta Krestomatia de la lingvo Esperanto*, kompilita de Zamenhof kaj eldonita de la fama pariza eldonejo *Hachette* fine de novembro 1903. Zamenhof rekomendis atentan trailegon de FK al ĉiuj lingvuzantoj kaj precipe al la eldonistoj,

ĉar tiu, kiu eldonas verkon en Esperanto, ne koniĝinte antaŭe fundamente kun la spirito kaj la modela stilo de tiu ĉi lingvo, alportas al nia afero ne utilon, sed rektan malutilon.

Por doni “utilan lernaĵon” en la formo de krestomatia, Zamenhof prenis tekstojn el tri fontoj:

— *Ekzercaro* (1894),

— gazeto (*La Esperantisto*) (1889–1894; nenio el 1895),


— poemaro *La Liro de la Esperantistoj*, eldonita de Antoni Grabowski en 1893;

kaj aldonis pecojn el siaj propraj verkoj, originalaj aŭ tradukitaj.

La *Ekzercaro* restas interesa ankaŭ nun pro la frazmodeloj, kvankam nun kelkajn frazojn oni eble ne taksus *politike korektaj*, ekzemple, “Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron” kaj “Se la lernanto sciis bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus”. Aliaj memorigas la foran epokon: “Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambrestinon, infanistinon kaj veturigiston”.

Tekstojn el (*La Esperantisto*) Zamenhof reviziis. Li ŝanĝis sisteme du siajn antaŭajn lingvokutimojn: en FK li minuskligis la singularan *Vi* al *vi* kaj uzis la apostrofitan artikolon (*l'*) nur en poezio, ne plu en prozo (kelkloke li forĵetis la artikolon).

Prozaj tekstoj estas dividitaj je kelkaj ĉapitroj: *Fabeloj kaj legendoj*; *Anekdotoj*; *Rakontoj*; *El la vivo kaj sciencoj*. Ili prezentas bonan legaĵon, sed la enhavo eksmodiĝis. Preskaŭ ĉiuj prozaj tekstoj estas verkita aŭ tradukita de Zamenhof.



Kvar kontribuoj aperas en la sekcio *Artikoloj pri Esperanto*. Du el ili estas prenitaj el la *Unua Libro*: fragmento el la *Antaŭparolo* kaj la deksex-regula *Plena gramatiko*. Du aliaj tekstoj estas: *Al la historio de la provoj de lingvoj tutmondaj de Leibnitz ĝis la nuna tempo* de Leopold Einstein resume tradukita de Zamenhof; kaj *Esenco kaj estonteco de la ideo de Lingvo Internacia*, verkita de Zamenhof mem sub la pseŭdonimo Unuel.

La poezia parto postulis pli da laboro, ĉar en *La Liro* Grabowski estis malpli redaktema ol Zamenhof en *La Esperantisto*, kaj multaj poemoj enhavas formojn, kiuj jam en 1903 ŝajnis mortnaskitaj. Zamenhof klopodis anstataŭigi ilin per ĝustaj formoj, sed tio ne estis facila. El la 110 poemoj de *La Liro* Zamenhof konservis nur 57 kaj aldonis dek kelkajn poeziajn verkojn originalajn kaj tradukitajn inkluzive de la unua akto de *Hamleto* (1894). Entute 70 poemoj de 29 aŭtoroj okupas trionon de la libro. (Ekde la dua eldono fine de la libro aperis la Zamenhova *Preĝo sub la verda standardo*, verkita okaze de la unua UK en Bulonjo-ĉe-Mar).

Fine de la antaŭparolo Zamenhof klarigis:

Ĉiuj artikoloj en la *Fundamenta Krestomatia* estas aŭ skribitaj de mi mem, aŭ — se ili estas skribitaj de aliaj personoj — ili estas korektitaj de mi en tia grado, ke la stilo en ili ne deflankiĝu de la stilo, kiun mi mem uzas.

Sed ĝuste la stilo ne plaĉis al la “dua patro de Esperanto”, Louis de Beaufront, kiu tuj post la apero amare skribis al Carlo Bourlet:

... ĉe pli ol duono la “Fundamenta Krestomatia” prezentas al ni, ne la stilon de la doktoro, sed la stilon, apenaŭ reviziitan, de personoj, kiuj plejparte sciis nur iomete Esperanton, kaj ne estis kapablaj elekti bonajn tekstojn, ĉar ili estis nekapablaj ili traduki kaj iafaje ilin bone kompreni.

Eble ĉi tiu kritiko ne estis tute malprava, sed la popularecon de la libro oni kutime juĝas laŭ reeldonoj. *Fundamenta Krestomatia* povas fieri, ja oni devas taksi sukceso la fakton, ke aperis entute 18 eldonoj.

Sed se ni rigardas pli atente, ni vidas, ke dum 1903–1912, ene de malpli ol dek jaroj aperis jam sep eldonoj: averaĝe unu eldono dum 17 monatoj. Inter la du mondmilitoj aperis pliaj naŭ eldonoj, kun pli malofta ritmo: unu libro dum tri jaroj.

Esperanto Publishing Company en 1946 eklaboris pri reviziita eldono, ĉar “la stilo de D-ro Zamenhof multe pli maturiĝis, ĝis tia grado, ke en 1917, kiam la Majstro mortis, *Fundamenta Krestomatia* jam ĉesis prezenti tute imitindan modelon de la Zamenhova Esperanto”. Tamen la originan ideon revizii la *Krestomatia* oni poste forĵetis, kaj lasis la tekston senŝanĝa kaj nur piednotis la ŝanĝojn, kiujn Zamenhof estus plej probable aprobinta. La dek-sepa eldono aperis en 1954, duonjarcenton post la unua eldono kaj dek kvin jarojn post la dek-sesa eldono.

Nova eldono, la dek-oka, printita de Gaston Waringhien, venis nur en 1992, preskaŭ kvardek jarojn post la dek-sepa. La piednotoj de Waringhien ne estas multaj; ili signas la evoluon de la lingvo ekde la Zamenhova tempo kaj indikas ne erarajn, sed ne plu uzatajn formojn.

La dek-naŭa eldono ne baldaŭ aperos, ja Esperanto riĉiĝis kaj evoluis, kaj en la nuna epoko FK ne plu estas lernolibro, stil-instrua libro, ekzerceto por estontaj verkistoj. Oni ne plu bezonas ĝin por gardi la lingvon de pereiga disdialektiĝo. Ĝi estas nia klasikaĵo, el kiu oni ĉerpas klarajn ekzercetojn por novaj lernolibroj kaj gramatikoj. Ĝi estas ankaŭ historie valorega kolekto, kaj, legante ĝin, oni povas miri, kun William Auld pri tio ke

malpli ol 16 jarojn post apero de la *Unua Libro*, eblis aperigi jam tiel ampleksan, varian kaj divers-aŭtoran antologion en Esperanto.

Halina Gorecka

Pli da mavo ol da bono

Krause, Erich-Dieter. *Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto.* — **Ham-burg: Helmut Buske Verlag, 2007.** — 1679 pĝ.

La apero de *Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto* de Erich-Dieter Krause sendube estas evento ne nur en la historio de la antaŭaj vortaroj D-Eo, sed ankaŭ en la tuta historio de la Esperanta leksikografio. Simile ampleksaj vortaroj ekzistas nur por la hispana (de Diego)¹, itala (Minnaja)² kaj japana (Miyamoto)³. En la historio de la germanaj vortaroj nur tri ludis limigitan rolon kompareblan: Christaller (1910, 2a eld. 1923)⁴, Bennemann (1926)⁵ kaj Wingen (1954)⁶. Ĉi lasta ne superis siajn antaŭulojn, sed naskiĝis simple el postmilita bezono.

La germanaj esperantistoj devis do atendi 80 jarojn por havi denove ampleksan konsultilon. La eldonisto asertas (malantaŭa kovrilo), ke ĝi enhavas “la tutan vort-trezoron de la ĉiu-tag-a lingvo”.

Evidente tio estas pura propagando, mil mejlojn for de la faktoj. Por povi adekvate recenzi la vortaron, necesus havi ĝin sur diskedo kiu permesus rapidan traserĉon. Nur tiel konstateblus, por ekzemplo, ĉu Krause efektive konsideris la tutan stokon de PIV, Neologisma Glosaro (Vatré), de sia propra vortaro Eo-D (1999)⁷ kaj antaŭ ĉio de la literaturo. La eldonisto ne intencas disponigi la vortaron en formo elektronika, kio klare indikas, ke li kaj la aŭtoro timas tian “travidebligon” de la verko. Por sperti la kvalitojn kaj mankojn de vortaro, necesas “vivi” kun ĝi. Jen aldona problemo: spertaj esperantistoj konsultos ĝin malofte, eble nur por serĉi vorton iom marĝenan aŭ fakan, dum nespertaj esperantistoj apenaŭ rimarkos la multajn fuŝojn. Ili simple kredos, ke ili devas diri *piloj* [tiel!] *kontraŭ malsato* (p. 94), ili ne lernos la vorton *brikoli* (D basteln), sed nur la Krause-parafrazon *metie amatori*, eble ili ekmiros pri *kaum Hava* (p. 652) por “holde Weiblichkeit” (t.e. niaj ĉarmaj damoj), ĉar de kie ili sciu, ke jen englitis indoneziaĵo?!?

Same ili akceptos la fuŝon *kalkpuco* (p. 713), ili ne rimarkos la mankon de akuzativo ĉe *merdi en la pantalono* (p. 1186), diros *lingvaĵo maltrafa* anstataŭ *katakrezo* (p. 1325), aplikos por “Teppichboden” (*mokedo*) la parafrazon de Krause (*tapiŝo kovranta la plankon de la tuta ĉambro*), kaj “Weinstraße”

estos por la naivuloj *vinstrato* anstataŭ *vin-vojo*...

Sed ili frustriĝos ankaŭ, kiam ili serĉos kurantajn vortojn kaj esprimojn kaj ne trovos ilin. Jen ekzemploj sendube nek esoteraj nek iel fakaj: *Altweibersommer* (*filigrana, indiana somero*), *Anstandswauwau* (*ŝaperono*), *GAU* (*nuklea katastrofo*), *Mischbatterie* (*miks-krano*) kaj miloj da aliaj mankoj. Por testi la efektivan mankon de ĉiu-tag-a vort-provizo mi enkomputiligis kaj alfabetigis du dokumentojn: la bulvardan ĵurnalon *BILD* de 2007-06-12 kaj la turisman revuon *Bierzeitung 2007* el Bavarujo. La rezulto montris, ke nur minora parto de la tiel akiritaj vortoj troviĝas ĉe Krause. Lia vortaro do eĉ ne sufiĉas por traduki bavaran menukarton, por ne paroli pri la urugvajaj...

Kiu serĉas “germanaĵojn”, ofte desapontiĝos, jen en la kampo gastronomia, ekz. *Maultaschen* (*ŝvabaj ravioloj*) aŭ *Streuselkuchen* (*krumela kuko*), geografia, ekz. *Allgäu* (*Algovio*) aŭ folkloraj: mankas amaso da figuroj fabelaj (*Frau Holle: Sinjorino Sambuk?*), mitologiaj (*Rübezahl*), ŝercaj (*Dick und Doof* aŭ la kolonjaj *Tünnes und Schäl: Toĉjo kaj Strabul?*).

Kiam okaze de la apero de antaŭa vortaro mi riproĉis al Krause la mankon de skatologia vort-trezoro, li objektis, ke ja enestas... skat-terminoj. Sub “Geschlechtsteil” (seks-organo) oni trovas la vortojn *midzi, penissuĉi, frandzi, vulvosuĉi, sesdeknaŭ[su]mi*, sed en la germana alfabeto ordi oni vane serĉos ilin. La metaforajn kaj slangajn esprimojn *buĥto, buŝino, ĉiĉo, kundo, pipiĉeto, pipinjo* aŭ eĉ *centra oficejo* por *vagino* oni kredeble trovos nenie. Oni mire konstatos ankaŭ, ke la vorto *Call-girl* ne ekzistas en Esperanto. Laŭ Krause D Puff estas vulgara (li diras “salopp”, sed neniu lia traduko de “salopp” taŭgas) esprimo por *Bordell*, sed la proponitaj tradukoj *prostituejo* (ĉu iu diras tion?), *bordelo* ne estas “salopp”. “Salopp” estus, por ekzemplo, *fikejo, fotrejo* aŭ *fornikejo*. La vortojn D Eroscenter (*grand-bordelo?*) kaj FKK-Klub (*kluba megabordelo*) li ne konas. Kiu indignos pri ĉi konstatoj miaj, rimarkos, ke ankaŭ sur la religia kampo mankas multo, ekz. Fronleichnam (*Krist-korpa festo*).

Ni ĉerpu ankoraŭ detaleton: ĉe kunmetitaj vortoj Krause plene arbitre uzas la ligan -o-, jen ĝin metas, jen ĝin lasas fakultativa aŭ tute ellasas: sistemo ne ekkoneblas (dormoĉambro,

dorm[o]ĉambro, dormĉambro). Tio validas eĉ pli por la uzo de la ligo-streko: nul regulo dedukteblas el la ekzemploj de Krause. Oni trovas unu apud la alia: am-filmo, sed amletero (p. 849), kontrol-esploro, sed kontrolveturo (p. 778), viv-komunumo, sed vivkunulo (p. 830), vizit-horoj, sed vizitprogramo (p. 216).

En tre frua recenzo rete aperinta la germana asekur-matematikisto Ulrich Matthias venis al la konkludo, ke rilate la fakan leksikon de lia ĉiu-tag-a laboro “la vortarego [...] estas tute mizera”. Certe ne nur tiu-fake.

Konkludo: La amplekso de la vortaro ne garantias pri la enesto de tre elementaj ĉiu-tagaj vortoj. Vortarojn de tia kalibro ne povas fari unuopuloj. Efektive necesus unue plene registri la Esperantan vort-trezoron (PIV estas nesufiĉa kaj arbitra selekto), ĝin traduki kaj poste inversigi. La vortaro de Wüster, se kompleta kaj ĝisdatigita, permesus tian procedon. Krause tro ofte inventas, lia vortaro ne respegulas la efektive ekzistantan lingvon, ĝi estas kabineta solvo de homo teoriumanta kaj sekve fantaziaĵo. En sia nuna formo ĝi faras pli da mavo ol da bono.

Reinhard Haupenthal

1. Diego F. de. *Gran Diccionario Español-Esperanto*. Santander: mga, 2003. — XX + 1279 p.

2. Minnaja C. *Vocabolario Italiano-Esperanto*. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1996. — 1438 p.


3. Miyamoto Masao. *Vortaro japana-esperanta*. Tokio: JEI, 1982. — VI + 1083 p.

4. Christaller P. *Deutsch-Esperanto Wörterbuch*. Berlin: Möller & Borel, 1910. — XXVI + 516 p.

5. Bennemann P. *Esperanto Hand-Wörterbuch*. 2. Deutsch-Esperanto. Leipzig: Hirt, 1926. — XX + 455 p.

6. Wingen H. *Wörterbuch Deutsch-Esperanto*. Limburg/Lahn: Vereinsdr, 1954. — 176 p.

7. Krause E.-D. *Wörterbuch Deutsch-Esperanto*. Leipzig: Verl. Enzyklopädie, 1983. — 594 p.



Ascendi Parnason, ekkonu Brazilon

Brazila Esperanta Parnaso / Komp. Sylla Chaves, Neide Barros Rego. — Rio-de-Janeiro: Oportuno, 2007. — 288 pĝ., il.

La grandioza poezia antologio *Brazila Esperanta Parnaso* enhavas 307 verkojn de 178 brazilaj aŭtoroj, i.a. 118 originalaĵojn de 35 esperantistoj. Estas reprezentitaj ĉiuj regionoj de Brazilo. Se ekzistis kelkaj tradukoj de sama portugallingva poemo — do la redaktoroj elektis aŭ eĉ kunmetis la plej bonan. Kelkaj poemoj estas kanteblaj — tio estas speciale markita. Ĉiu poeto estas prezentita per biografio kaj foto.

La paĝoj estas sen numeroj, anstataŭe estas numeritaj la verkoj, paragrafoj de la antaŭparolo, biografioj k.s., ĉio listigita en 12-paĝa enhavtabelo kaj komence de ĉiu libroparto. Estas strange kaj sufiĉe neoportune: oni eĉ ne povas tuj diri, kiom da paĝoj havas la libro (tial “p”. ĉi tie signifas ne paĝon, sed poemon). Plia strangaĵo: la aŭtoroj estas listigitaj alfabeto laŭ antaŭnomoj, sed ne laŭ familinomoj.

Sylla Chaves jene klarigas siajn principojn: “Por verki trafajn mesaĝojn nepras al beleco kunigi simplecon. En la lingvo de Zamenhof eblas simple pritrakti kompleksajn kaj seriozajn temojn. Kaj Esperanto devas resti tia por fariĝi la lingvo de la Tria Jarmilo”.


Unu el celoj de la antologio estas instigi pedagogojn, debutajn poetojn. Sylla Chaves en la antaŭparolo prave skribas, ke “Esperanta poezio ne estas premĉemizo de frenezulo, sed agrabla vestaĵo, interne de kiu vortoj malpeze moviĝas, kvazaŭ dancante. Mi estas konvinkita pri tio, ĉar Esperanta poezio helpegis mian lernadon, perfektigon kaj enamiĝon al la lingvo. Bedaŭrinde tia poezio lastatempe perdiĝas meze de hermetaĵoj kaj malfluaĵoj, kaj bezonas esti apartigita de la cetero”.

Plejparte — kvankam ne centprocente — la afero sukcesis. Alilandaj legantoj pli multon ekscios pri Brazilo, komencantoj el ĉiuj landoj pli intime konatiĝos kun Esperanto-poezio.

La temoj kaj ĝenroj estas eternaj por poezio — do mi eĉ ne listigos ilin. Por mi estas agrable konstati, ke klasikaj formoj ne formortis el nia poezio: la antologio enhavas, ekzemple, multajn sonetojn. Populara por Brazilo poemformo “troboj”, sendependaj sepsilabaj kvarversaj (enestas specimenoj de kelkaj aŭtoroj) spirite parencas al rusaj

“ĉastuŝki”, azerbajĝanaj “bajatilar”... supozeble similaĵojn havas ĉiu popolo. Senteblas, ke la poetoj amas sian landon. Eblus kompari brazilanojn kun iuj famaj poetoj el aliaj mondopartoj — ie tuj videblas simileco — sed preferindas ne serĉi. Ĉiu vera poeto estas neripetebla individuo.

Vere laŭindas poemoj de Aloísio Sartorato, ravas la mikrominiaturoj de Diderto Freto, 14 sonetoj de Geraldo Mattos (eĉ se la senco ne ĉiam klaras — p.26), kelkaj (ne ĉiuj!) verkoj kaj tradukoj de Leopoldo Knoedt (p.53,54 kaj tradukoj bonegas, sed p.48,56 kun tede remaĉata temo de komuna lingvo evitindas); bonegas sonetoj de Manoel Borges dos Santos (precipe p.62, kun vualita nekutima alegorio pri Esperanto), ĉio de Moseo (precipe p.74 *La malnova trajno*, kun brilaj onomatopoeoj). Sylla Chaves sukcesis en ĉio, kiel la redaktoro, poemtradukisto kaj originala poeto — liaj poemoj bele kanteblas (tio senteblas eĉ laŭ presita teksto), majstraj vortludoj memorigas pri Raymond Schwartz, kaj la ciklo de unusilabaj sonetoj (p.105) vere virtuosas.



El tradukaĵoj elstaras per freŝaj metaforoj *La feraĵisto el Karmono* de J.C. de Melo Neto, tr. G.Mattos kaj *La strata lanternisto* de J. de Lima, tr. L.Knoedt. Mi mencias nur la plej brilajn poemojn — la listo de simple tre bonaj estus tro longa...

Certe ĉeestas ankaŭ malsukcesaj pecoj: kutimaj naivaj, peze-banalaj laŭdegoj al Esperanto (G.Soeira, p.38; G.Goes, p.39, negativan impreson pligrigas fuŝaj rimoj; B.Ferreira, p.153). 4 pecoj de B.Silva, primitivaj, tro facile parodieblaj, kaj 5 de M. Nazaré Laroca, kun ĉiuj negativaj trajtoj de modernismo, memadmiro, kun plena manko de ritmo, rimoj kaj senco, certe estas tro — sufiĉus preni po 1 poemeto, aŭ preferi aliajn aŭtorojn. La samo direblas pri tradukitaj poemoj 200 kaj 247.

Memorfikseblas kaj citindas la fragmentoj:

Senorde, sennorde, nenien mi iras
(Moseo, p.73)

— *Aĉetas dolaroj progreson*
de l' mondo,
kaj marŝas homaro al brila estonto!
— *Ja marŝas... marŝadas marŝaloj*
armitaj...

Aĉetas? Aĉegas dolaroj militaj!
Doloraj dolaroj!
— *Ni gajnis!*
— *Nur ŝajnis!*
(Sylla Chaves, p.103)

“Vi estas flor’, kun petaloj
humidaj pro milda roso;
mi estas floro, el ŝoso
falinta sur la ĝarden’.”
Tia estas lastatempe
la lirika poezio:
vi — tio; kaj mi — ĉi tio;
vi kun ĉio, kaj mi sen...
(Artur Azevedo, tr. Sylla Chaves, p.139)

se sen Suno vivo mankas,
sen Lun’ mankas poezio.
(Ruth Farah, tr. Sylla Chaves, p.283)

Ampleksa komentario detale pritraktas brazilan naturon, ekzotajn por ni bestojn kaj plantojn, landan historion kaj geografion, tradiciojn de portugallingva versfarado k.m.a. Por la sama celo servas multaj ilustraĵoj, plejparte koloraj: mapo de Brazilo, portretoj de ĉiuj aŭtoroj, fotoj de lokaj vidindaĵoj ks. Kelkaj bildoj ilustras konkretajn poemojn.

La lingvaĵo estas preskaŭ modela, nur iom ĝenas sistema uzado de “parfumo” kun la senco “(natura) bonodoro” (sankciita de NPIV, sed nekutima por granda parto de esperantistoj), la artikolo kune kun posedpronomoj kaj superflua akuzativo post “mankas”.

Pro kutimoj de portugallingva poeziado alilanda leganto perceptas en pluraj poemoj lamadon aŭ eĉ plenan foreston de ritmo — kvankam la silabonombro ĉie enordas kaj rimoj staras ĝustaloke...

Tiu poemaro multe pli utilas por disvastigo de “la bona lingvo”, ol amaso da ple(n)daj artikoloj. Supozeble, eĉ *koreaj komencantoj* kontentos... Tial ni indulgu ne ĉiam altan nivelon. Certe, en tiom granda antologio ĉiuj pecoj ne povas esti egale altnivelaj.

Sendube, *Brazila Esperanta Parnaso* apartenos al plej gravaj libroj aperintaj en Esperanto, staros inter la plej valoraj naciaj antologioj.

Valentin Melnikov

Bibliaj tradukproblemoj

Recenza eseo de Sergio Pokrovskij

La tria parto de recenzo pri la nova versio de *Biblio*, preparita de IKUE kaj KELI kaj eldonita de KAVA-PECH. La unuajn partojn vidu en LODE, 2008, №1, 2.

Traduko de traduko

Traduko de la kromlibroj malnovtestamentaj prezentas la saman problemon, kiel la traduko de la Nova Testamento: la fonto por niaj tradukoj ne estas la originalo, ĝi mem estas traduko (plejparte greka) de tekstoj pri realaĵoj kaj ideoj alikulturaj. En tia situacio estiĝas dilemo:

- Ĉu la esperantigo strebu prezenti la perditan originalon hebrean (realan aŭ supozatan)?
- Ĉu anstataŭe ĝi fidele transdonu la apartaĵojn kaj perturbojn de la peranta traduko?

Analogie, ĉu kopiante ĉefverkon de Rafaelo, honesta kopiisto (mi ne parolas pri falsistoj) strebu redoni la kolorojn kaj la aspekton de la bildo tia, kia (supozeble) ĝin pentris Rafaelo — aŭ eble la kopiisto fidele reproduktu la ŝimon kaj ceterajn difektojn de ĝia aktuala stato?

En LB¹ la Malnova Testamento estas tradukita rekte el la hebrea; la Nova, el la greka. Krome, ekzistas Septuaginto, kiu dokumentas la rilaton inter la terminaro hebrea kaj la biblia terminaro greklingva, tiun saman interrilaton, kiun uzis la tradukintoj aŭ aŭtoroj novtestamentaj. Tial la vorto *διαθήκη* en la Nova Testamento esperantlingva preskaŭ ĉiam aperas ne en la tradicia eŭropa mistraduko *testamento* (konforma al la ĉefsenco de la greka vorto), sed kiel la Zamenhofa *interligo* — konforme al la propra senco de la hebrea ברית (*bərit*), kiun Septuaginto ial esprimas per *διαθήκη*.

La sia kaj la fremda

Tradukante tekston pri aferoj fremdaj oni ĉiam atentu la kulturan fonon, sugestatan de la konceptoj kaj vortoj. Mi ilustru tion per traduko el la franca en la rusan de la tragedio “Fedra” de Racino. Ĝia enhavo estas malnovgreka mito; ĝin verkis franco, kaj ĝi certe estas parto de la francaj literaturo kaj tradicio. Tiun

francecon maleblas tute neglekti, tamen oni zorgu, ke ĝi ne estu troa, ridinda kaj parodia; oni ankaŭ sentu, ke laŭ la deklaro de Racino mem, lia verko estas inspirita de la samtema tragedio de Eŭripido.

Franclingve onin ne ŝokas la versoj:

*O haine de Vénus! O fatale colère! (...)
Neptune vous la doit! Quoi?
vos vœux irrités...*

Ŝajnas ke por la francoj de la Racina epoko *Vénus*, *Neptune* (Venero, Neptuno) estas neŭtralaj, hejmaj, ĝeneralaj nomoj por la koncernaj gedioj; tamen por la rusoj *Венера*, *Нептун* estas nomoj specife ankritaj en la tradicio latina: por rusoj la latinaj dioj estas periferiaj paŭsaĵoj de la grekaj. Tial en rusa teatro nomo latina en tia verso sonas parodie kaj komike: Neptuno rilatas al Pozidono proksimume kiel Sankta-Klaŭso al sankta Nikolao; ankoraŭ ne komenciĝis la Troja milito, Eneo ne venis Italion, ne naskiĝis Romulo kaj Remo — do, ekzistas neniam Romo, eĉ ne kiel vilaĝo, kaj la de neniun konata barbara *Venero* estas eĉ malpli imagebla en la buŝo de atena reĝino ol la pli antikva *Iŝtar*. Tial la rusa tradukisto (M.A. Донской) devis regrekigi la nomojn:

*О, рок! О, ненависть жестокой
Афродиты! (...)
Что, что? Твою мольбу услышит
Посейдон?*



Kulturo

Kaj jen kontraŭa ekzemplo. En mia alitema recenzo (LODE, 2002, №3, pĝ. 16) mi rakontis pri uzo de francigita nomo *Jean de Plan Carpin* en esperanta teksto, supozeble kompilita surbaze de fonto franclingva. Temis pri historie grava italdevena vojaĝanto, franciskano kiu verkis latine, kiun oni kutime nomas per asimilita formo de lia latinigita nomo (kiel oni ĝenerale faras pri la latinigitaj nomoj, rigardante ilin etnokulture neŭtralaj): *John of Plano Carpini*, *Johann von Carpin* ktp. Do, estis tute normala ke la franca fonto uzis francan asimilaĵon; en la franca teksto ĝi estis neŭtrala. Sed kopiite en tekston esperantan ĝi iĝis specife franca, kaj tial erara: necesis aŭ reasimili esperante (ekz-e *Johano el Plano la Karpena*); aŭ reveni al la neasimilita formo latina *Iohannes de Plano Carpini*; aŭ eble (malpli ĝentile, ĉar rifuzante la pretendon je la klera latineco) konjekti formon italan (*Giovanni da Pian del Càrpine?*); sed ĝia formo asimilita france, angle aŭ germane en esperanta teksto estas tradukeraro.

Mirinde, sed multaj okcidentanoj la analogian manieron traduki greke asimilitajn hebreaĵojn per transskribo de la grekaĵoj opinias modela, “moderna” kaj “sciencia”. Ekzemplon pri tio ni trovas jam en LB.

Infero, Ŝeolo, Hadeso

La hebrea vorton *Šeol* Septuaginto senhezite grekigis per *Hades*. Ambaŭ vortoj respondas al la unua el la du ĉefaj signifoj de la fundamenta *infero* laŭ ties difino en la PIV-oj:

***infer/o** 1 Ĉe la antikvuloj, subtera loko, kie loĝis la animoj, bonaj aŭ malbonaj, de la mortintoj: *Vergilio* rakontas viziton de Eneo en la infero. (...)

Laŭ sia koncepto universalisma kaj laŭ la dumiljara tradicio, Zamenhof tradukis *Šeolon* per *infero* (ekz-e en Nom 16:30, Ps 16:10 ktp); laŭ siatempa kaj sialanda modo la britaj redaktantoj ŝanĝis tion al *Šeol*, farante la neŭtralan inferon speciale hebrea ekzotaĵo; malbele, pedante, sed iel pravigeble.

Tamen surprizo atendas la leganton en la Evangelioj:

Kaj vi, Kapernaum! ĉu vi estos altigita ĝis la ĉielo? vi malsupreniĝos ĝis *Hades* ... [Mat 11:23].

La judo Jesuo, parolante al siaj judaj disĉiploj, evidente celas la “subteran lokon”, lialingve nomatan *Ŝeol* (kp Rea 32:22), kiun la Septuaginta tradicio de la evangeliistoj nomis per la greklingve neŭtrala vorto *Hades*; en Esperanto simile neŭtrala estus *infero*; historie ĝusta estus *Ŝeolo*. Tutcerte Jesuo ne celis *specife grekan* inferon, la regnon de Hadeso kaj Persefono. Sed en teksto esperantlingva ĉi tiu formo, kiu greklingve estis *neŭtrale greka, nespecifa*, iĝas formo *specife greka*, ĝi ricevas ĝuste tian etnokulturan specifecon, kian celis eviti la greka teksto; eraro ne nur stila, sed ankaŭ senca, ĉar la specifeco (ĉi-okaze greka) estas alia ol la specifeco aramea-hebrea kiun solan povus celi (kvankam probable ja ne celis) Jesuo.

Nun mi ne parolos pri taŭgeco de la vorto *infero* (tiu temo estas malsimpla kaj mi intencas verki pri tio apartan artikolon); mi nur konstatas malkoheron: se oni elektis *Ŝeolon* por la Malnova Testamento, oni do plu uzu *Ŝeolon* ankaŭ en la Nova; la britaj tradukistoj ja faris tion en unu okazo — en la *Agoj* 2:25–31, kie Petro citas el Ps 16:10; sed en la resto de la Nova Testamento regas la malkonvena *Hades*.

Eĉ pli groteske aspektas *Hadeso* en *Tobit* 3:10:

Aŭdinte tion, ŝi tiom malĝojis, ke ŝi volis pendumi sin. Sed ŝi diris: mi estas la sola infano de mia patro. Se tion mi faros, tio estos hontigo por li kaj en *ĉagreno* mi *kondukos* lian maljunecon al *Hadeso*.

Juna judino loĝanta en Ekbatano (nun la irana urbo Hamadan) en la epoko de la asiria reĝo Sanĥerib (Tob 1:18, 2Kr 32:1), pli ol 3 jarcentojn antaŭ Aleksandro kaj la greka konkero, same ne povus pensi pri la greka *Hadeso*, kiel Fedra ne povus nomi latinajn diojn. Ŝi ne pensis pri la malliberejo de Aĥilo, Patroklo, Antiloĥo, Telamonido Ajakso kaj Agamemnono; certe ŝi menciis *Ŝeolon*, la restadejon de Abrahamo, Isaako kaj Jakobo. Ŝia parolo pri patro mortonta pro malĝojo pri sia pereinta ido frape similas tiun de Gen 42:38, kie la sama Jakobo diras:

Se lin trafos malfeliĉo sur la vojo, kiun vi iros, tiam vi *enirigos* miajn grizajn harojn *kun malĝojo* en *Ŝeolon*.

(Cetere en ambaŭ okazoj temas ne pri teologia revelacio koncerne la postmortan ekzistolokon, sed pri ordinara lingva kliŝo por *morti*; kaj Zamenhof donis tute trafan situacion tradukon per egalvalora kliŝo esperanteca: ... *kun malĝojo en la tombon*. Zamenhof tradukis sencon per senco; KB² eĉ ne tradukas vorton per vorto, ĝi transskribas literon per litero: שואל → *ŝeol*, ᾗδης → *hades*.)

Menciindas, ke por *Tobit* ekzistas tekstoj hebrea kaj arameaj; tradukante ĝin, Hieronimo uzis *librum chaldaeo sermone conscriptum* (libron en “ĥaldea” lingvo); hebrea pecoj de *Tobit* estas trovitaj en Kumrano. Ĉu eblas imagi *Hadeson* en tiaj ŝemidlingvaj tekstoj?

La biblia lingvaĵo

En Joh 20:19 la evangeliisto rakontas:

Kiam do estis vespero en tiu sama tago, la unua de la semajno, kaj kiam estis fermitaj la pordoj, kie la disĉiploj estis, pro timo antaŭ la Judoj, Jesuo venis kaj staris meze de ili, kaj diris al ili: Paco al vi.

Legante tion mi iom bedaŭras fuŝitan efekton: la kontraston inter la longe preparata streĉo — kaj la subita elnodiĝo per la simpla saluto. Ĉar evidente Jesuo simple salutis per “Ŝalom aleĥem”, kaj la normala situacia traduko estus: “... kaj li diris al ili: Saluton.” La nekutima salutformo donas al la vortoj de Jesuo gravecon kian ili ne havas en versio hebrea aŭ arablingva. (Cetere, tian hebreaĵon entenas ankaŭ MT en “la raporto, kiun ili sendis al li, havis la sekvantan tekston: *Al la reĝo Dario plenan pacon* ...” [Ezr 5:7]; neniuj tamen atribuas al ĉi tiu salutformulo religian gravecon.)

Ĉi-okaze la greka traduko entenas hebreaĵon, kiu estas tradukinda se oni rigardas la fonton greklingva kaj la hebreaĵon konscia; sed oni ankaŭ atentu, ke la bibliaj tekstoj estas verkitaj ne en la klasika greka lingvo, sed en judeca ĵargono de Septuaginto. Kaj en tiu ĵargono “Paco al vi” eble estis same neŭtrala, kiel “Saluton”.

Tiajn hebreaĵojn de la greka traduko la nacilingvaj plutradukoj imitas, kaj tiel estiĝas biblia ĵargono nacilingva. Interalie, “paco(n) al vi” iĝis parto de la eklezia lingvaĵo (tamen specife eklezia, dum ĉe la ŝemidaj popoloj ĝi ĉiam estis kaj restas trajto komunlingva). Iuj eĉ rigardas tion pliriĉigo de la nacilingvoj; tamen tia ĵargono facile povas konduki

al miskomprenoj, kiajn ni trovas jam ĉe la novtestamentaj aŭtoroj.

Mi jam menciis la ĝustan manieron traduki la vorton *διατήρη* per la Zamenhofa *interligo*. Ĉi-okaze la esperantaj tradukistoj deviis de la tradicio de la bibliaj tradukoj, kaj ĉi-okaze mi plene aprobas tian devion.

Egale mi aprobas, ke en Heb 9:13–17 ili tamen aplikis la tradician mistradukon, ĉar ties verkinto evidente ne sciis la hebrean lingvon kaj ne komprenis la septuagintan terminon *διατήρη*; hebreeca traduko de lia sofismo neniigus lian tutan argumenton:

Ĉar se la sango de kaproj kaj bovoj ... sanktigas ĝis la purigado de la karno: kiom pli la sango de Kristo ...? Kaj pro tio li estas interulo de nova *testamento*, por ke (post kiam morto okazis por la elaçeto de tiuj pecoj, kiuj estis sub la unua *testamento*) la vokitaj ricevu la promeson de la eterna heredaĵo. Ĉar kiam estas *testamento*, nepre devas esti la morto de la *testamentinto*. Ĉar *testamento* efektiviĝas rilate mortinton, ĉar ĝi neniam efikas, dum vivas la *testamentinto*.

La nekonatan aŭtoron de Heb 9:15–17 (kiu evidente estis paŭlano sed ne Paŭlo) probable inspiris Gal 3:15–22, kie Paŭlo lerte sugestas la ideon de Heb 9:15–17 (interalie, kalemburante per la greka vorto en epistolo adresita al greklingvanoj) — kaj tamen zorge sin tenas en la kadro de la koncepto hebrea (kaj sekve lasas la eblon uzi *interligon* en la traduko, eĉ se perdante la konvinkan forton de la kalemburo).

Resume, estas tri ebloj traduki:

1. Ĉe la rigora laŭvortismo (kiel en la slavona Biblio) oni uzas la *testamenton* eĉ en la frazoj kiel “Kaj Jonatan faris kun David *interligon/testamenton*, ĉar li ekamis lin kiel sian animon” [1Sam 18:3]. Oni perfortas la lingvon en ĉiuj libroj — tamen la sola peco Heb 9:13–17 *ŝajnas* bonorda (tamen sence ĝi ja restas malkohera kun la resto).

2. Alia eblo estus disigi, uzi *interligon* en la Malnova Testamento kaj *testamenton* en la Nova (tiel LB kaj KB kondukas pri *Ŝeol* kaj *Hades*).

3. Ĉe la nuna laŭsenca traduko suferas nur unu peco (Heb 9:15–17), kiu tutegale estas miskoncepta ĉe ajna tradukmaniero.

Krome, la esperantaj Biblioj retenas la tradiciajn misnomojn de la du partoj de la Sankta Skribo kristana: la Malnova, la Nova *Testamento* — kvankam ĉi-rilate estas nenia interna kialo por fari tiel; male, per tio perdiĝis la motivo de

tia nomado, ĉar en la profetaĵo, sur kiu baziĝas tiu titolado [Jer 31:31–33], aperas la ĝusta *interligo*:

Jen venos la tempo, diras la Eternulo, kiam Mi faros kun la domo de Izrael kaj la domo de Jehuda *interligon novan*: ne tian, kiel la interligo, kiun Mi faris kun iliaj patroj ...

La nomoj propraj

Pri la nomoj propraj en KB, cetere kiel jam en LB, regas plena ĥaoso. Laŭ atesto de Waringhien (“Lingvo kaj vivo”, 1989, p. 279), Zamenhof mem hezitis pri esperantigo, kaj en diversaj partoj publikigitaj en diversaj jaroj liaj esperantigoj variis; ekz-e en la *Psalmaro* (1908) estis *Adamo*, sed la poste tradukita *Genezo* parolas pri *Adam*. Unuecigon Zamenhof konfidis al la Biblia Komitato — kaj la rezulton ni vidas en LB.

Tre malmultaj nomoj hebreaj restis plene esperantigitaj: *Eternulo*, *Moseo*, *Josuo*, *Salomono*, *Samaro*. Bone.

Multe pli multe da nomoj estas simple transskribitaj. Tio estas preskaŭ neevitebla, ĉar en Biblio abundas sensencaj genealogioj kun la nomoj de alie nekonataj personoj, kiujn tutegale normala leganto ne atentis. Tamen surprizas ke ankaŭ tre gravaj nomoj, kiel *Adam*, *Jehuda*, *David*, *Jakob*, *Daniel* ... estas traktitaj same senzorge. Kun *Adamo*, *Jehudo*, *David*, *Jakobo*, *Danielo* la teksto estus pli glata; cetere, la Nova Testamento pli volonte uzas tiajn formojn: *Jakobo*, *Mateo*, *Johano*, *Lazaro* ... Mi tre ĝojas, ke *Salomono* havas plene esperantan formon — tamen ĉu lia patro malpli meritas tion?

Iuj nomoj estas absurde ĥimeraj, nek plene esperantaj, nek originale hebreaj: *Benjamen*, *Jozef*, *Isaak*, *Izrael*, *Jerusalem*, *Samuel*, *Simeon* ... Se la Fundamenta nomformo *Jozefo* ial (kial?) malkonvenas, la hebrea formo estus *Josef*. Jerusalemo estus *Jeruŝalajim* laŭ la hebrea, aŭ *Hierosolima* laŭ la greka — kial do ĝi aperas en ambaŭ Testamentoj kvazaŭ anglaĵo?

La nomoj nehebreaj estas pli volonte esperantigitaj — ne nur relative, sed eĉ absolute iliaj plene asimilitaj formoj estas pli multenombraj. Tio paradokse inversigas la perspektivon: “la siaj” de Tanaĥo aspektas en LB barbare kaj fremde; “la fremdaj” de la naciaj aspektas hejme kaj esperantece. Kp

- *Jerusalem* — sed “urbo Tiro” [Jos 19:29], “Damasko” [Jes 10:9] (la

rivala kaj malpia “Samaro” estas mirinda escepto);

- *David* — sed “Ciro, reĝo de Perujo” [Ezr 1:2], “la reĝo Dario” [Ezr 6:1];
- “*Izrael* estos trioje kun Egiptujo kaj Asirio” [Jes 19:24].

La greka nominativo

Kiom MT hontas pri la esperanta o-nominativo, samtiom KB flegas la grekajn s-nominativojn; ŝajnas ke la editoroj tiom fieras pri sia scipovo de la greka nominativo, kiom ili hontas pri sia esperantisteco. Konservas en traduko la balastajn nominativfinaĵojn grekajn estas kutimo de la tradicioj ĝermanaj; tial la germanoj aŭ angloj probable malpli klare sentas, kian maskeradan aspekton tio donas al la hebreaĵoj. Male, en la tradicioj slavona, rusa, kaj (iom malpli konsekvenca) latinida oni kutimas formeti la grekan pakumon; tial reprezentantojn de tiaj tradicioj (almenaŭ min) ĝi ĝenas.

MT ne aŭdacis asimili la nomon “Tobija” (ekz-e Ezr 2:60), dum Septuaginto senhezite faris tion (laŭ la greka deklinacio; nominative *Τωβίας*) por ĉiuj 5 personoj tianomaj; KB zorge konservas la grekan nominativfinaĵon en “Tobias” ene de la peco tradukita el la greka (ekz-e Tob 2:1), kaj lasas la neasimilitan “Tobija” por la ceteraj.

Verdire, almenaŭ unufoje la greka nominativa finaĵo perdiĝis en akuzativo: “Johano, patro de *Eŭpolemos*” [2Mak 4:11] → “Judas elektis *Eŭpolemon*, filon de Johano” [1Mak 8:17]; sed tia germaneca mikseklino probable estas neintencita plumeraro (tamen ja prognozebla konsekvenca de la sensistemeco).

Apartan okazon prezentas la nomo *Jehudo*. Dum la tuta historio (kaj ĝis nun) ĝi estis unu el la plej ŝatataj en la juda popolo; tamen tiel okazis, ke en la evangelia rakonto ĝin portis la perfidulo. Tial mi facile komprenas la strebon eviti ke la negativa sento, kiun vekas en la kristanoj tiu persono, makulu la gloran nomon, kaj la iom naivan provon apartigi la nomformon de la perfidulo: “Kiso antaŭ amaso estas kiso de *Judas*” [Proverbaro]. (Pro la simetrie pozitiva motivo la nomformo *Jesuo* estas apartigita disde la pluraj *Josuj* de MT kaj *Jesu* en Luk 3:29, Kol 4:11.)

Ĉi tiun motivon la NT-tradukistoj ne komprenis aŭ ignoris. Kvankam ili ja rehebregas la grekigitan nomon de la prapatro en la genealogioj (ekz-e Mat

1:2), tamen la ceteraj Jehudoj en la tekstoj tragrekaj aperas kiel Judasoj (ekz-e la frato de Jesuo, Mar 6:3; aŭ presbitero de la jerusalema eklezio, *Agoj* 15:22).

Jehudo Makabeo, יהודה המכבי (Jehudah Ha-Makabi, Jehudo la Martelo), la ĉefo de kontraŭgreka ribelo, aperas kiel *Judas nomata Makabeo* [1Mak 2:4]. El la du greke asimilitaj partoj, *Ιούδας Μακκαβαίος*, la hebrea antaŭnomo aperas grekigite sen asimilo; sed la egale hebrea nomepiteto aperas kiel asimilita grekaĵo.

Inverse, lia kontraŭulo, la reĝo *Antioĥo Epifano* aperas kiel *Antioĥo Epifanes* [1Mak 1:10]; do, ĉi-okaze la antaŭnomo estas asimilita, dum la nomepiteto (aŭ la trononomo) *Epifanes* (= Epifano, la Eminent) retenas la grekan nominativfinaĵon (la Klementa Vulgato asimilis kaj tradukis: *Antiochus Illustris*).

Ekzemplojn pri tia sensistemeco eblus plu kaj plu amasigi. “Eŭfrato, Tigris kaj Hidaspes” [Judit 1:5]. Se “Eŭfrato”, kial ne la kutima “Tigriso”? Se “Tigris”, kial ne “Eŭfrates”?

Traduko redaktenda

Tradukinte la bibliajn kromlibrojn G. Berveling faris grandan kaj salutindan laboron; tamen la traduko ankoraŭ bezonas lingvan kontrolon kaj redaktadon. Jen kelkaj lokoj kie redaktisto povis helpi.

“Kiam mi *returniĝis* al mia domo” [Tob 2:1] = revenis hejmen.

“Li fariĝis reĝo en la *jaro cent tridek sep* de la regado de la Grekoj” [1Mak 1:10] (kaj la sama eraro en 1Mak 1:20,

“Kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaso”. (gravuraĵo de Gustave Doré)



3:37, 6:16, 7:1, 10:1,57,67, 11:19, 13:41, 14:1,27, 15:10...). Laŭ la Fundamenta Ekzercaro, §12, devas esti “la jaro cent tridek *sepa*”. Eĉ la anglalingva KJV laŭas la Fundamenton: “in the hundred and thirty and *seventh* year”. Kp ankaŭ Nom 33:38. Cetere, jen en *Judit* 2:1: “En la *dek-oka* jaro de sia regado, en la dudeka tago de la unua monato, decidis Nebukadnecar ...”

“Atendu min ĝis mian patron mi informis” [Tob 5:7] — kp “atendu Min, diras la Eternulo, ĝis Mi Miatempe *leviĝos*” [Cef 3:8].

“Morta” anstataŭ “malviva”, “mortinta” [Tob 1:17].

La leksiko ne ĉiam estas biblia (ne ĉiam stile koheras kun la tradicio de LB); ekz-e aperas la vortoj *lamenti* [Tob 10:4]; *ostaĝo* [1Mak 1:10]; *rankoro* [Manase 13].

Aliflanke, por la senco *infanteriano* aperas mallerta *pedirantaj soldatoj* [*Judit* 1:4, 2:15]. Se la tradukisto ne hezitas uzi *generalon* [*Judit* 2:14, 1Mak 3:13], kial ne uzi la samstilan *infanterianon*? Se oni volas eviti modernajn militterminojn, eblus diri pli lerte *piesoldatoj*. (Jes, en *Eliro* aperas “pedirantaj viroj”, tamen nur okaze kaj ne kiel termino militista.)

Plurloke la interpreto de la teksto estas esplorinda. Ekz-e laŭ *Ester* 1:1j,

La reĝo prienketo la du eŭnukojn; ili konfesis kaj estis forigitaj.

La seneŭfemisma rusa traduko ŝajnas pli versimila, konsidere ke temis pri konspiro kontraŭ la tre kolerema reĝo: li *torturigas* la eŭnukojn, ili konfesis kaj estis *ekzekutitaj*.

Dankesprimo


Mi ne posedas la Zamenhofan tradukon de Tanaĥo, kaj kelkaj miaj supozoj pri ĝi estis bazitaj sur nura intuicio pri la stilo Zamenhofa. Kolego Gerrit Berveling, la tradukinto de la kromtekstoj de KB, afable trovis por mi la Zamenhofan tradukon de la suspektindaj lokoj, ŝanĝante mian supozon en certecon. Mi sincere dankas lin pro tiu granda komplezo.

Notoj

1. LB: la Londona Biblio, “La Sankta Biblio” eldonita en Londono kaj Edinburgo.

2. KB: la recenzata “Biblio” eldonita de KAVA-PECH, ISBN 80-85853-90-6.

FINO



Lingvo kaj kulturo en Berlino

Esperanto. Lingvo kaj Kulturo en Berlino. Jubilea Libro 1903–2003. Enrigardo, Rerigardo, Antaŭenrigardo / Red. Fritz Wollenberg. — Novjorko: Mondial; Berlino: Esperanto-Ligo Berlin, 2006. — 368 pĝ., il.

Ekonomia, financa kaj milita forto de Berlino dum la regado de Vilhelmo II estas garantio de potenco de la Germana ŝtato. Berlino kreskas kapturane, en 1900 ĝia loĝantaro nombras 1,5 mln. Post la unua mondmilito, abdiko de la imperiestro kaj proklamo de la Unua Respubliko aperas nova Berlino, kiu absorbas la apudajn komunumojn. Naskiĝas Berlino de la 1920aj jaroj kaj de la Vajmara respubliko. Estas tempo de nekredibla renovigo. Liberspirito stimulas kreadon, intelekta kaj arta vivoj bolas. Neniu urbo kapablas konkurenci kun Berlino; ĝi iĝas monda ĉefurbo de amuzado, teatro, bohemo kaj avangardo. En 1921–1923 Berlino estas iaspeca centro de rusa intelekto. Ĉi tien venas el Moskvo kaj Petrogrado verkistoj kaj poetoj, pentristoj kaj ĵurnalistoj; la urbo estas unu el la celoj de elmigrado.

Ni, esperantistoj, vivecan bildon de Berlino ricevas el la romano de Vladimir Varankin *Metropoliteno*, priskribanta la eventojn fine de la dudekaj jaroj:

Berlin estas riĉega urbo! Ĝi havas tiom da muzeoj, bildgalerioj, ekspozicioj, palacoj! Ĝi havas tiom da teatroj, kinejoj, varieteoj! Ĝi havas tiom da interesej institucioj! Kiom da tempo oni bezonas por almenaŭ trakuri la famajn

muzeojn kaj verdajn aleojn da tondetitaj ĝardenoj!

Ne estas hazardo, ke en novembro 1903 socie, kulture kaj science agantaj personoj malfermaj al novaj ideoj fondis Esperanto-societon em Berlino. La fondon iniciatis svisa ĵurnalista Jean Borel. Inter la fondintoj estis aŭstra publicisto Alfred Hermann Fried, poste nobelpacpremiito, internacie rekonata germana geofizikisto Adolf Schmidt, estro de observatorio sur la monto Telegrafenberg en Potsdam, franca vortareldonisto Marcel Pagnier, pedagogia reformisto kaj gimnazidirektoro Wilhelm Wetekamp kaj aliaj, cetere membroj de la Germana Pacsocieto.

Internacia rondo de la komenco daŭre restis tia ĝis la nuna tempo. Ni menciuj almenaŭ kelkajn nomojn, ĉiuj estas internacie konataj: pola filmisto Jan Fethke, franca verkisto Louis Beaucaire, rumana lingvisto Ignat Bociort, usonano Gary Mickle kaj multaj aliaj, kiuj kreis kaj kreas la Esperanto-kulturon en Berlino.

Centjara datreveno de loka aŭ internacia evento estas bona preteksto por organizi celebradon, atentigi amaskomunikilojn kaj, fine, aperigi prian verkon.

Tamen la recenzata libro ne estas plena historio de la berlina Esperantomovado; multaj temoj, personoj, eventoj restas nepriskribitaj. Dum 100 jaroj estas kreitaj multaj nevideblaj amikecaj ligiloj inter Berlino kaj aliaj lokoj de la mondo. Videbligi kelkajn el tiuj ligiloj celis la eldonintoj. Diversaj kaj diversspecaj kontribuoj kiel mozaikeroj kreas bildon kun personeca vizaĝo de la Esperanto-vivo en Berlino.

En la libro oni trovas personajn rememorojn kaj spertojn apud science ellaboritaj eseoj. Renkontiĝoj kaj vojaĝoj, libroj kaj revuoj, kulturaj aktivaj aĵoj, instruado, lokaj grupoj, naciaj kaj internaciaj organizaĵoj, Esperanto-projektoj, estas temoj de tiuj kontribuoj, kiuj havas, interalie, germanlingvajn resumojn. Multegaj fotoj vivigas la libropagojn.

Mi intence mencias neniun nomon el la kontribuintoj, ĉar tia listo tro ŝveligus mian tekston, sed ofendi iun per ellaso mi ne deziras. Mi nur nepre menciuj gigantan laboron, kiun faris la redaktoro de la libro Fritz Wollenberg, kies faka kompetento esperigas min iam havi ankaŭ libron pri la historio de Esperanto en la germana ĉefurbo.

Halina Gorecka

“La Ondo de Esperanto” en la jaro 2007

Ni ja antaŭvidis, ke pro la altiĝo de la baza tarifo kaj, ĉefe, pro neeble okazigi inform-kampanjon por la abonjaro 2007, la abonantaro de *La Ondo* neeviteble reduktiĝos post ok jaroj de konstanta kreskado. Ĉi tiel okazis, sed, feliĉe, malpli ol ni timis, ĉar la malkreskon preskaŭ kompensis nove enkondukitaj ret-abonoj (entute, dudeko). Rezulte en 2007 *La Ondo* ricevis sume 539 kotizojn, nur je 6 abonoj malpli ol en 2006, kiam nian revuon abonis rekorde multaj 545 personoj. Ni taksas ĉi tion kontentiga rezulto.

	1998	1999	2000	2001	2002	2003	2004	2005	2006	2007
Ruslando	147	133	122	115	101	98	104	92	93	91
Aliaj landoj	136	170	238	257	305	407	421	450	452	448
Entute	283	303	360	372	406	505	525	542	545	539

En plej multaj landoj la abonstatistiko apenaŭ ŝanĝiĝis. La plej granda malkresko estis en Pollando (-7), kie ni perdis kelkajn abonantojn pro la komentario de Komitatano Z pri la fermo de la kurt-ondaj programoj de la Pola Radio. En Danlando, Germanio, Usono estis je 5 abonoj malpli ol en 2006. La plej granda kresko (+6) estis en tri landoj: Finnlando, Francio kaj Serbio (en kiu estis neniu abono en 2006 kaj ses abonoj en 2007).

Jen la listo de la landoj kun pli ol dek abonantoj (enkrampe estas la nombroj por 2007):

Ruslando	91 (93)	Italio	22 (25)
Pollando	59 (66)	Svedio	21 (19)
Germanio	39 (44)	Brazilo	20 (15)
Francio	38 (32)	Belgio	19 (19)
Finnlando	28 (22)	Hispanio	15 (17)
Britio	23 (27)	Japanio	13 (16)
Usono	23 (28)		

Kvankam ankaŭ ĉi-jare ni preskaŭ ne partoprenos esperantistajn renkontiĝojn, ni kredas, ke *La Ondo* denove havos pli ol 500 abonantojn. Komence de februaro la abonstato estis simila al tiu de kelkaj antaŭaj jaroj.

AIKo

Ricevitaj libroj

Brazila Esperanta Parnaso / Kompilis Sylla Chaves, Neide Barros Rego. — Rio-de-Ĵaneiro: Oportuno, 2007. — 288 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Esperanto. Lingvo kaj Kulturo en Berlino. Jubilea Libro 1903–2003. Enrigardo, Rerigardo, Antaŭenrigardo / Redaktis Fritz Wollenberg. — Novjorko: Mondial, Berlino: Esperanto-Ligo Berlin, 2006. — 368 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Programoj de Esperanto-instruado en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz / Redaktis Andrzej Grzębowski. 3a eld. — Bydgoszcz: Skonpress, 2007. — 20 pĝ.; 1000 ekz. — [Donaco de ISTK].

Алпатов, Владимир. *История одного мифа: Марр и марризм*. Изд. 2-е, доп. — М.: Едиториал УРСС, 2004. — 288 с.; 960 экз. — [Donaco de Anatolij Sidorov].

En la libro estas menciitaj pluraj esperantistoj kaj interlingvistoj.

Дубин, Арсений. *Фуртатская улица*. — М.: Центрполиграф, 2005. — 432 с., ил.; 4000 экз. — [Donaco de Anatolij Sidorov].

C. 83–84. [Pri S.N. Podkaminer]. C. 282–284. [Pri societo “Espero” kaj pri Esperanto].

Кондрашов, Николай. *История лингвистических учений*: Уч. пособие. Изд. 3-е, стереотипное. — М.: КомКнига, 2006. — 224 с., ил. — [Donaco de Anatolij Sidorov].

C. 27–28. Попытки и проекты создания международных языков.

Ricevitaj gazetoj

Brazila Esperantisto. 2007/331; Esperanto USA. 2008/1; Esperanto en Azio. 2008/58; Esperanto. 2008/2; Femina. 2007/12; Heroldo de Esperanto. 2007/16; Juna Amiko. 2007/2,3; Komencanto. 2007/5-6; La Gazeto. 2008/134; La KancerKliniko. 2008/125; La Ondo de Esperanto. 2008/2; La Revuo Orienta. 2007/12; La Sago. 2007/40; Monato. 2008/2; REGo. 2008/1; Sennaciulo. 2007/12; Service de Presse. 2007/40; Svisa Esperanto-Societo Informas. 2008/1.

Donacoj 2007

Abonhela fondajo

Anonima (NL) 143.0 EUR
Gerd Bernhard (DE) 3.0 EUR
Sergej Bronov (RU) 3510.0 RUR
Dorota Burkhard (PL) 60.0 PLN
Jos. R. Koch (CH) 49.0 CHF
E-klubo Munkeno (DE) 68.0 EUR
Jukka Pietiläinen (FI) 18.0 EUR
Paulo Sérgio Viana (BR) 25.0 EUR
Entute, dum 2007. 397.5 EUR

Fondajo Amiko

Anonima (NL) 100.0 EUR
Anonima (RU) 15100.0 RUR
Bronislav Ĉupin (RU) 60.0 RUR
Bernhard Eichkorn (DE) 25.0 EUR
Leopold Patek (AT) 7.4 EUR
Raita Pyhälä (FI) 80.0 EUR
Gennadij Ŝlepĉenko (RU) 210.0 RUR
Entute, dum 2007. 639.3 EUR

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Danke al la anonima donacinto el Ruslando, dum la tuta jaro 2008 vi ricevas ĉiumonate kvar ekstrajn paĝojn kontraŭ la senŝanĝa kotizo. Se la pli dika *Ondo* plaĉas al vi, bonvolu pripensi, ke danke al via helpo la revuo povos resti same ampleksa ankaŭ venont-jare.

La donacojn bonvolu sendi al nia UEA-konto “avko-u”, aŭ al vialanda peranto de *La Ondo*. Eĉ la plej etaj sumoj estas bonvenaj.

HaGo

Nova peranto en Kanado

La landa asocio estas nia peranto en Kanado. La abonprezo de *La Ondo* en Kanado estas 47 CAD, aerpoŝta aldono 7 CAD, ret-abono 18 CAD.

Bonvolu uzi jenan adreson:

✉ Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, 2372 Haddington, Ottawa Ontario K1H 8J4, Kanado.

☞ yan@storm.ca




Por la januara tasko *La Rado* venis 19 respondoj, krom du, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis Andrej Kirienko (Belorusio), Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen, Ajra kaj Erkki Röntynen (Finnlando), Marc Bavant, Jean-Luc Tortel (Francio), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Petras Čeliaskas (Litovio), Ester Olsen (Norvegio), Hanna Skalska, Stanisław Płachta (Pollando), Viktor Alikin, Klara Ilutoviĉ (Ruslando), Roland Larsson (Svedio), Jurij Gurov (Uzbekistano).

La ĝusta respondo: En malsata familio mankas harmonio.

La loto donis libropremion al **Viktor Alikin**. Gratulon!

Maratono



1. Rita tablo (R); 2. Plata pilkojeto (R); 3. Markolo inter Eŭropo kaj Malgranda Azio, kiu kunligas la Egean kaj Marmoran marojn; 4. Urbo kie okazis la 93-a UK; (R) 5. Vostskvanto (birdo); 6. Cedi; 7. Okcidenteŭropa lando (R); 8. Ĉefurbo de Pakistano; 9. Malhelpo; 10. Tio, kio impresas flarsenton (R); 11. Rivereto inter la Roma teritorio kaj la Cisalpa Gaŭlio (R); 12. Mallonga rivero sur limo de Usono kaj Kanado kun fama akvoŝalo; 13. Flanko de horizonto (R); 14. Ĉiu el la Romaj ofici-stoj, elektitaj de la plebo por defendi ties rajtojn kontraŭ la Senato (R); 15. Itala insulo en Mediteranea maro (R); 16. Linio sur mapo, kiu kunigas diversajn punktojn de tera surfaco kun egala temperaturo (R); 17. Dukejo en Suda Eŭropo sur bordo de Mediteranea maro (R); 18. Urbo en Pollando; 19. Lago kaj provinco en Kanado; 20. Scipovo difini sur loko flankojn de horizonto (R); 21. Monunuoj de Serbio (R); 22. Urbo en Brazilo (R); 23. Proverbe: ĉiuj vojoj kondukas tien (R); 24. Maro de Atlantika oceano inter Eŭropo kaj Afriko; 25. Ĝin bekas kokido kiam elŝeliĝas (R); 26. Fazo de Luno; 27. Akuta, ... , obtura angulo; 28. Granda marbirdo blanka kun nigraj flugiloj (R); 29. =Mal-laŭta.

Viaj respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 15a de aprilo 2008.

Kompilis **Viktor Alikin**

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Popolliga pontoporto

Japana Esperanto-Instituto ... apelacias, ke Esperanto portu unu el la pontoj, kiuj ligas popolojn... (<http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/3756>, 8 feb.)

"Ne chesu, ne chesu!" - en kor' al ni sonas...

Fine de 2007 la memortabulo pri Andreo Ches estas denove pendigita en Sibiu (Rumanio) kun teksto en la rumana, germana k Eo. (*La Ondo de Esperanto*. 2008, №2, pĝ. 12; trovi kaj titolis Valentin Melnikov)

De planedo al paneo?

Radio Pekino! Nun estas programero Esperanto en Marso. (...) Finiĝis programero Esperanto en Marĉo. (http://esperanto.ineast.com/east_institute/newpage42.htm)

Laŭdatu urboj ĝemelaj

Laŭdate okazis La 2-a Kunveno de Ĝemelaj Urboj dum la 90-a UK. (Informilo de Ĝemelaj Urboj, Jaro 5 N-ro.3 /18/, septembro 2006)

Maĉeto replikis al Chávez

Poste, la venezuela prezidento akompanate de la unua vic-prezidento kuba Raúl Castro ... vizitis la orientan urbon Santiago de Cuba, kie li iĝis la unua eksterlanda civitano kiu ricevis la replikon de la maĉeto de la generalo Antonio Maceo kiel simbolo de bonveno... (<http://www.cubanoticioj.ain.cu/2007/1224despedidachavez.htm>)

Glima brilo

Antaŭpaloro. (titolo de la enkonduko en *Esperanto kaj mi*, Eseoj de 180 esperantistoj el 17 aziaj landoj, 2007, pĝ. 1; rimarkis Ionel Oneț)

Oraj mamoj

Tiu-ĉi ĉarma semajno en Zakpoane ĉiam restos en nia memoro. Kaj tiu ĉi paĝo estas mamoraĵo post Ago-Semajno 2004. Jam nun ni volas denove inviti Vin al ASO 2005. Estos same fentaste (<http://www.pej.aplus.pl/aso/aso-2004>; rimarkis Louis F. v. Wunsch-Rolshoven)

Ni ploras Puron

Nerologon pri Claude Puron legu en la retejo de *La Ondo de Esperanto*... (<http://groups.yahoo.com/group/per-esperanto-literaturo/message/2485>, 23 jan 2008)



Ankoraŭ unu Zamenhof-Taga bildo de Abengo (Tajvano)



19–25 mar. Senigallia (Italio). *32a Internacia Junulara Festivalo* ✉ Nicola Ruggiero, via Trento, 57-59, 70042 Mola di Bari (BA), Italio. ✉ ijf.admin@esperanto.it

21–28 mar. Waldfishbach (Germanio). *24a Printempa Semajno Internacia* ✉ Jörg Gersonde, Hermann-Wäschke-Str. 31, DE-06366 Köthen, Germanio. ✉ psi@esperanto.de

11–14 apr. Amano (Jordanio). *1a Mezorianta Kunveno* ✉ mezorienta.kunveno@gmail.com

18–20 apr. Napolo (Italio). *Seminario 2008 Internacia Jaro de Lingvoj — ĉu pliaj ŝancoj por Esperanto?* ✉ Via S. Brigida, 64, I-80132, Napoli, Italio. ✉ esperanto.napoli@libero.it

19–26 apr. Kastelo Grezjono (Francio). *FRINGOJ 2008* ✉ Elizabeth Barbay 25, allée Gabriel Fauré FR-93140 Bondy, Francio. ✉ eliz.babay@wanadoo.fr

19–26 apr. Blera (Italio). *4a Astronomia staĝo* ✉ Alexander Mikishev, P.O.Box 1400, Neshar, 36772, Israelo ✉ alexmikish@gmx.net

09–12 maj. Essen (Germanio). *85a Germana Esperanto-Kongreso* ✉ Christian Darbellay, Kaiserstr. 39 DE-24143 Kiel, Germanio ✉ Esperanto-Kiel@gmx.de

17–24 maj. Poznań (Pollando). *60a Internacia Fervoja Kongreso* ✉ Dom Kultury Kolejarz, Al. Niepodległości 8A, PL 61-875 Poznań, Pollando ✉ pefa@op.pl



26–30 maj. Vilno (Litovio). *Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Jurnalistoj*. Temo: Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto ✉ p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio ✉ litova.ea@mail.lt

29 maj – 1 jun. Krajmorie (Bulgario). *Internacia Mara Esperanta Renkontiĝo*. ✉ Georgi Mihalkov, BG-1229 Sofio, j. k. "Nadejda" V, bl. 529, vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario ✉ modest@abv.bg

10–18 jun. Mielno (Pollando). *30a Ĉebalta Esperantista Printempo* ✉ PEA, Box 30, 75-016 Koszalin-1, Pollando ✉ barslavo@wp.eu

26 jun – 2 jul. Olsztyn (Pollando). *FREŜO* ✉ 10-684 Olsztyn, ul. Orłowicza 35 m 5, Pollando ✉ efrenzkowska@wp.pl

5–12 jul. Ventpils (Latvio). *44aj Baltiaj Esperanto-Tagoj* ✉ p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio ✉ margarita.zelve@gmail.com

11–18 jul. Montrealo (Kanado). *7a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto* ✉ informo@take7.ca

11–19 jul. Herzberg / la Esperanto-urbo (Germanio). *Internacia Esperanto-Kultursemajno* kaj 38a Studsesio ✉ DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr. 6, Germanio. ✉ esperanto-zentrum@web.de

12–18 jul. Ŝempeter pri Gorici (Slovenio). *Internacia Esperanto-Konferenco 2008*. ✉ Eric Laubacher, 1, rue de Bougainville, 78180 Montigny le Bretonneux, Francio ✉ kasisto@osiek.org



19–26 jul. Roterdamo (Nederlando). *93a Universala Kongreso de Esperanto* ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ✉ uea@inter.nl.net

26 jul – 2 aŭg. Szombathely (Hungario). *64a Internacia Junulara Kongreso* ✉ HU-1675 Budapest, Pf. 87, Hungario ✉ ijk@tejo.org



Ociano. La kunlaboro de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda asocioj — kies prezidantoj David Ryan (NZEa) kaj Igor Couto (AEA) estas sur la foto — montras ekzemplon por aliaj landaj asocioj, per regulaj komunaj kongresoj (vd. pĝ. 6)



Kroatio. Esperanto-Societo Rijeka denove havis sian grupon Esperanto-Maskerada Kompanio *Paždroć* ("tohuvaĵo" en la kroata ĉakava dialekto) en la tradicia karnavalo en Rijeka. La nomo estis klare videbla sur la veturilo, kaj Esperanto-anonco sonis por la publiko je ĉiu kontrol-punkto. (Vjekoslav Morankić / Branko Popović)



Brazilo. Dum la Brazila karnavalo, ne ĉiuj esperantistoj karnavalis; iuj kunvenis en Lorena por tute nova kleriga aranĝo *BEL-konferencoj 2008*, tamen ankaŭ ili havis gajan humoron, vd. pĝ 5. (Paulo Sérgio Viana)




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA KUNULARO DE L' RINGO

Tolkien J.R.R. *La Kunularo de l' Ringo*.
La unua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
464 paĝoj, 30 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA DU TUREGOJ

Tolkien J.R.R. *La du turegoj*.
La dua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
368 paĝoj, 27 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA REVENO DE LA REĜO

Tolkien J.R.R. *La reveno de la Reĝo*.
La tria volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
328 paĝoj, 24 eŭroj.



Georges Simenon. *La flava hundo*.
La kvara Esperanto-libro pri komisaro Maigret.
120 paĝoj, 12 eŭroj.